

EN ESPERANTO


ISSN 0032-4361

10 1996

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Reveno de paŝtado

Foto de HAN HONG

INTER NI

Ni jam aperigis artikolojn pri grena produktado kaj problemoj de manĝado en Ĉinio. En ĉi tiu numero aperis la artikolo "Vizito al Mainzlando". Ni esperas, ke tiuj artikoloj helpas al niaj legantoj koni la modernan konstruadon kaj popolan vivon de Ĉinio. Agrikulturo estas fundamento de la nacia ekonomio de Ĉinio. Sen ĝi ne eblus moderna konstruado de Ĉinio, nek pliboniĝus la popola vivo. Ĉinio kun granda loĝantaro nepre devas produkti multe da greno por vivteni sian popolon.

Nun la voĉo por medi-protektado pli kaj pli altiĝas tra la mondo. Kia estas medi-protektado en Ĉinio? Kia estas la primitiva arbaro en la Granda Xing'an-montaro post la

incendio? Kiel Ĉinio protektas rarajn bestojn kaj vegetalojn? Kiel Ĉinio forigas median polucion? Ni raportis pri medi-protektado en la artikoloj "Blanknaĝila Delfeno — Trezoro de Ĉinio", "Ĉe Tenger-dezerto" kaj "Kampanaro kaj Lia Aligatorejo" kaj artikolo-serio en la rubriko "Reordigo de Huaihe-rivero". En ĉi tiu numero aperis ankaŭ la artikolo "Lulilo de Nordorient-ĉinia Tigro", kiu konigas la nunan staton de la tigro kaj penadon por ĝin protekti. Ni esperas, ke ajna detruado de ekologia ekvilibro estos haltigita kaj la homaro vivos en la harmonia naturo.

En ĉi tiu numero estas ankaŭ artikoloj plenaj je vivetoso. Ili estas "En Dormoĉambro de Studentinoj", "Diversaj Naciaj Festoj en Ĉinio" kaj "Mia Franco-edzino".


La Red.

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Lulilo de nordorient-ĉinia tigro
- 6 Grandan respekton al d-ro André Albault
- 7 *POR KOMENCANTOJ:*
Mia humura edzo
- 8 *ĈINAJ E-ISTOJ:*
Hu Guozhu en Esperantujo
- 12 *ORIGINALE VERKITAJ:*
Surĉevale en edzecon; Konfeso
- 14 *ESP-NOVAĴOJ*
- 16 *TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:*
La ĉinaj ideogramoj en komputado
- 17 Vizito al maizlando
- 21 Vizito al Diaocha-lago
- 22 Ekranaro kun pentraĵoj pri la Ruĝdoma Songô
- 24 *SUR NIA LIBROBRETO:*
Sorĉa panoramo de la socia vivo
- 25 *NUNTEMPA BELARTO:*
Lignogravuristo Zhou Yunxian
- 28 *MIA VIVO:*
Mia franco-edzino
- 29 *LAŬ LA SILKA VOJO:*
Nacio alveninta laŭ la Silka Vojo
- 36 Verdaj manĝaĵoj en Ĉinio
- 38 *MULTNACIA ĈINIO:*
Diversaj naciaj festoj en Ĉinio
- 40 Por la informa ekspresa vojo de Ĉinio
- 41 Kvadrata korto kaj kuirforno
- 42 En dormoĉambro de studentinoj
- 44 *KURANTAJ AFEROJ*
- 46 *POR VIA SANO:*
Sengrasiga gimnastiko
- 47 Fraŭlino Jiaona (Novelo)
- 50 *GALERIO:*
"Umefloroj kaj Cignoj"
SUR LA KOVRILO:
En vilaĝa korto Foto de Han Hong
- 2 Reveno de paŝtado
SUR LA DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
Itala metal-skulptisto kaj e-isto Marto
Converto en kreado
S-ano Marto Converto kaj liaj verkoj

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Jilin (p. 17)
2. Hanchuan-gubernio (p. 21)
3. Tianjin (p. 36)
4. Yunnan-provinco (p. 25)
5. Harbin (p. 4)



Lulilo de nordorient-ĉinia tigro

NI veturis en densa arbaro frekventata de tigroj kaj kvankam tiuj ofte atakis nian aŭton, feroce muĝante, tamen ni, sen danĝero, povis libere rigardi kaj foti ilin tra la fenestroj. Tio ĉi estas Ĝardeno de Nordorient-ĉiniaj Tigroj nove starigita de la Hengdaohezi-a Kultura Centro de Felisedaj Bestoj en Harbin, Heilongjiang (Hejlongĝjang)-provinco.

Kun areo de miliono da kvadrataj metroj, la ĝardeno situas en la norda antaŭurbo de Harbin, proksime de la pitoreskejo Suna Insulo. En la ĝardeno vivas 30 maturaj tigroj, troviĝas tigras nestoj, funkcias por ili nutrajprepejo, malvarmiga konservejo k.a.

En iu bela mateno mi venis en la ĝardenon tiel frue, ke la tigroj ankoraŭ dormis. Post kelka tempo ili eliris el sia nesto. Ili aŭ intime salutis unu alian per reciproka lekado aŭ silente kuŝis sub ombriĉaj arboj kun la streĉitaj ore-

loj por aŭskulti birdokanton. Nia aŭto proksimiĝis al granda tigro. Kun granda kapo kaj akraj ungoj ĝi majestis antaŭ la rigardantoj. Estis okulfrapaj ĝiaj nigraj strioj sur la orangflava frunto, kiuj formis ĉinan ideogramon 王 kun la

ĝeniero de la ĝardeno, informis al mi, ke, ĝenerale dirite, nordorient-ĉinia tigro vivas ĉ. 20 jarojn kaj seksmaturiĝas en la aĝo de 4 jaroj. En la pariĝa tempo, tigrinoj muĝadas por allogi virtigron. Tamen ili estas severaj en elektado de kunulo. La tigroj pariĝas nur tiam, kiam ili akordiĝis unu kun la alia. Post seksumo la tigrino turnas sin al la vira kaj gratas ĝin por repagi por ĝia brutala agado aŭ por esprimi sian amon.

Ilia fekundigo estas tre grava por la ĝardeno. En la komenco la ĝardeno havis nur 8 tigrojn, kiuj venis ĉefe el zooj de diversaj lokoj de Ĉinio. Poste en la ĝardeno la nombro de tigroj iam atingis 84. En 1988 iu tigrino naskis unufoje 5 idojn, tio rompis la rekordon de la artefarita fekundigo de la ĝardeno. Alia tigrino sinsekve naskis 20 idojn de post 1988. Pro tio ĝi portas la nomon Heroino Tigro-patrino.

Por multigi la nombron de tigroj de 8 al 84 en la ĝardeno, multajn malfacilojn venkis la zoologoj, kiuj neniam kontaktiĝis



En bredado de tigrido

Foto de HE ZONGYUE

signifo de reĝo. Jen kial oni nomas ĝin reĝo de la bestoj.

S-ro Liu Xinchun, altranga in-

kun tigroj.

En protektado de siaj idoj la tigro-patrinoj agas tute malsame.

Iuj el ili, singardemaj kaj nervozaj post akuŝo, permesis neniun proksimiĝi al la tigridoj. Pro iomete da bruo kaj skuo ili leviĝas kaj rondiradas en la nesto, tenante la idon per sia faŭko. Aliaj tute ne prizorgas siajn idojn, tial la bredistoj devas gardi ilin tagnokte. Kiam tigrino premas sub si la idojn, la bredistoj tuj forpelas ĝin per bastono. Triaj forlasas siajn idojn post ilia naskiĝo. Tiam la bredistoj devas nutri ilin per lakto, sed ili ne sciis suĉi per cicumo. Bredistoj ne sciis, kiaj devas esti la lakta temperaturo kaj denseco, nek la kvanton por unu fojo nek tempon inter dufojaj manĝadoj. Ĉion tion malfacile esploris la bredistoj.

Kompreneble, la bredistoj serĉis ankaŭ taŭgajn nutristinojn por tigridoj. Foje ili venigis hundinon, sed tiu tremadis de timo antaŭ la tigridoj. Oni do perforte kuŝigis ĝin por mamnutri la tigridojn, kiuj ankoraŭ ne malfermis siajn okulojn, avide suĉis lakton de hundino. Estis interese, ke la hundino ne plu timis ilin post 3 tagoj kaj ofte lekis ilin dum mamnutra-

do. Kaj pli poste ĝi mem venis ilin mamnutri. Tio daŭris entute 40 tagojn. Post demamigo la hundino ofte sin amuzis sur herbejo kun la tigridoj. Kiam la tigridoj iom plikreskis, bredistoj portis ilin al suna loko kaj promenigis ilin en la ĝardeno. Post 6 monatoj la tigridoj longis pli ol unu metron, de ĝojo ili ofte sin ĵetis sur la bredistojn kaj ameme ilin lekis.

En la ĝardeno la tigroj prenas bovaĵon kiel sian ĉefan manĝaĵon. Ĉiutage unu matura tigro bezonas almenaŭ 5 kg da bovaĵo. Oni devas enmeti ankaŭ kalcian pulvoron, vitaminojn kaj digestigan drogon en la manĝaĵojn por tigridoj. Oni ofte engardenigas vivajn kokojn, anasojn, kaprojn kaj bovojn, por ke la tigroj mem kaptu ilin cele konservi sian sovaĝecon.

En postpluva mateno mi kaj s-ro Liu promenigis en arbareto ekster la ĝardeno. Menciante la perspektivon de la ĝardeno, s-ro Liu diris: "Ni faras ĉion ĉi por ke la nordorient-ĉiniaj tigroj revenu en la naturan arbaron kaj tie daŭre vivu generacio post generacio, ĉar

la ĝardeno funkcias nur kiel artefarita rezervejo de raraj pereontaj bestoj."

Mi scias, ke nun ekzistas arbitraj arbohakado kaj ĉasado. Je tio s-ro Liu daŭrigis kun grava mieno: "Kompreneble, antaŭ ni estas multaj malfaciloj. Nun la ŝtato aplikas diversajn rimedojn por protekti kaj racie utiligi la naturajn riĉfontojn, malpliigi poluciadon, severe puni kontraŭleĝan arbohakadon kaj ŝtelĉasadon, kun la celo reekvilibrigi la detruitan ekologion, por ke la nordorient-ĉiniaj tigroj povu tie vivi, ĉar en la naturo tigroj estas altrangaj konsumantoj. Vegetalo satigas herbovorajn bestojn kaj la lastaj estas manĝaĵoj de la karnovoraj. Tigroj vivas ĉiam en la lokoj kun stabila ekologia ekvilibro. Jen kial la homaro donas grandan atenton al la protektado de tigroj. La minaco de pereado de la nordorient-ĉiniaj tigroj estas alarmo por la homaro."

Mi deziras, ke nordorient-ĉiniaj tigroj kiel eble plej baldaŭ revenu en sian propran hejmon — la senliman arbaron. ■

Anoncoj varbataj

"El Popola Ĉinio" naskiĝis en 1950. Depost la naskiĝo ĝi konigas Ĉinion kaj la ĉinan kaj alilandan E-movadojn kaj per tio akcelas la interkompreniĝon kaj amikecon inter la ĉinaj kaj diverslandaj esperantistoj. Ĝi distribuigas al 157 landoj kaj regionoj kaj servas kiel ligilo de amikeco inter la ĉina kaj alilandaj popoloj.

Por bone disvolvi la rolon de Esperanto en la kampoj ekonomia, scienca kaj kultura la redakcio fondis Reklaman Fakon en 1995.

Ni kore invitas vin varbi ekstermovadajn anoncojn kaj fari viajn anoncojn en EPC. Varbintoj de ekstermovadaj anoncoj

ricevas 20%-an makleraĵon. Detalaj informoj haveblas ĉe: **Redakcio de El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio.**

Telefono: + 86-10-68321808

Fakso: + 86-10-68321808

TARIFO

	USD
Dorskovrilpaĝo	2 000
Reverso de dorskovrilpaĝo	1 500
Interna paĝo (kolora)	1 000
Interna paĝo (nigra-blanka)	500

*50%-prezo por duonpaĝo. Por movadaj anoncoj validas duona prezo.

Grandan respekton al d-ro André Albault



D-ro André Albault

NIA estimata samideano d-ro André Albault (Francio) demisiis post sia 12-jara intensa klopodo sur la posteno de prezidanto de la Akademio de Esperanto. D-ro Werner Bormann (Germanio) daŭrigas lian oficon. Nome de la redakcio de El Popola Ĉinio, ni esprimas koran dankon al la demisiinto kaj varman gratulon al la nova prezidanto de tiu grava institucio en nia Esperantujo.

Ĝuste kiel d-ro Albault skribis en sia artikolo "Retrospektive": "Spuroj de mia laboro sine de la Akademio sin trovas jam en la du unuaj Aktoj de la Akademio, kiujn eldonis la Akademio sub la gvido de Gaston Waringhien (1901-1991). En la Aktoj 1963-1967, kiel Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro mi prezentis studon, 'La vortfarado en Esperanto' (p.58 ĝis 70). Ĝin mi redaktis kunlabore kun Kálmán Kalocsay kaj sub la kontrolo de la Sekcianoj."

Post Gaston Waringhien kaj Auld, d-ro Albault estis elektita prezidanto de la Akademio en 1983. Li estis tri fojojn reelektita. En tiuj 12 jaroj li multe klopodis por nia lingvo. Li tenis la Akademion laboranta per siaj Cirkuleroj, en kiuj li amplekse traktis la aktualajn problemojn de la lingvo kaj de la institucio.

Prezidanto Auld iam petis d-ron Albault surpreni la direktorecon de sekcio pri la landnomoj kaj ankaŭ Albault volis redukti la tiel nomatan "landnoman haoson". Post lia prezidantiĝo de la Akademio tiu problemoj fariĝis la ĉefa esploraĵo de lia prezidanteco, al kiu li dediĉis tre fortan atenton. La membroj de la Akademio prilaboris la temon kun li, voĉdonis plurfoje pri liaj proponoj, oni atingis la

opinion de la plimulto, ĉio ĉi daŭris jarojn ĝis fina listo establiĝis. Krome d-ro Albault publikigis du librojn pri landnomoj, *Vojaĝo tra la landoj kaj Multlingva glosaro pri land-nomoj* (ambaŭ en 1991).

Elstara evento dum lia prezidanteco estis la kollokvo de la Akademio "Pri la stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto" en Prago, 1994. Li preparis ĝin, verkis sian kontribuojon, sed evidentiĝis, ke li malgraŭ ĉiu volo ne partoprenis eble pro sanstato.

Kiam ni esprimas nian dankon al d-ro Albault, ni ne povas ne mencii lian fidelan amikon Jean Thierry, sekretarion de la Akademio. Ĝuste dank' al ties helpo, d-ro Albault povis atingi brilajn sukcesojn.

Alta sento pri la valoro de la internacia lingvo ĉiam gvidis d-ron Albault. Li sentis doloron, kiam li trovis en ĝi punkton ŝajne malpli bonan. Tial li laboris ĉiam energie.

12 jaroj, kvankam palpebruma daŭro en la homa historio, tamen estas longa tempo por ĉiu ajn persono. D-ro Albault do dediĉis gravan parton de sia vivo al nia lingvo. Ni, ĉinaj esperantistoj, eble ankaŭ ĉiuj aliaj membroj de nia Esperantujo, ne povas ne montri koran dankon al li.

D-ro Werner Bormann estas eminenta esperantisto, fama en la tuta esperantistaro. Ni pensas, ke li certe sukcese daŭrigos la aferon de nia Majstro d-ro Zamenhof, kaj ankaŭ tiun de Waringhien, Auld kaj Albault, kaj atingos pli brilajn sukcesojn en laborado. Ni varme gratulas lin kaj anticipas dankas lin pro liaj sukcesoj. ■

Mia humura edzo

de CHEN LIXING

KIAM mi fariĝis novedzino, mi ŝajnis min serioza kaj ordonis mian edzon konfesi al mia amhistorion. Li senzorge eldiris la vortojn: “Vi estas elektita el cent.”

Li diplomiĝis el fama universitato, dum mi studis nur kelkajn jarojn en kolegio. Post la naskiĝo de la infano mi ofte diris, ke li lernos en fama universitato kiel lia patro. Aŭdinte tion, mia edzo diris: “Tio ne gravas. Se li similos al vi, li povos edziĝi al tiu, kiu similos al mi, male, se li similos al mi, li povos edziĝi al tiu, kiu similos al vi.”

Mia edzo havas bonan temperamenton. Kvankam mi plurfoje incitis lin, li ne koleris. Foje, ne povante min deteni de tio, mi demandis lin pri la kialo. Ŝajnis al li, ke mia demando estis tre stranga. Rigardante min, li respondis per demandoj: “Kolerero? Kontraŭ kiu? Kontraŭ vi, ĉu mi kuraĝas? Kontraŭ nia infano, ĉu mi tion eltenas? Kontraŭ aliaj, ĉu indas?”


Li scipovas ludi kartojn, sed li neniam hazardludas eĉ je plej malgranda monsumo. Foje, je mencio pri tio, mi laŭdis lian persistemon, li tamen diris: “Ne persistemo, sed malforta psika eltenemo. Se mi gajnus, mi sentus bedaŭron al miaj amikoj, kaj se mi perdis, mi sentus bedaŭ-

ron al vi.”

Li havas multe da fortaĵoj, sed lia plej granda malfortaĵo estas lia malŝato de mastrumado. Kiam li mastrumas, li estas malĝoja. Foje, ne povante min deteni de kolerero, mi demandis lin: “Ĉu vi estas mallaborema aŭ malsana? Se mallaborema, vi nepre devas dividi kun mi respondecon por la hejma laboro ekde hodiaŭ; se malsana, mi volonte flegos vin por la tuta vivo.” Li ŝerce respondis: “Mallaborema malsano.”

De longe mi volas plibeligi miajn palpebrojn per operacio. Iutage, mia kolegino, kiu estis operaciita je la palpebroj, gastis ĉe ni. Post ŝia foriro mi demandis lin, ĉu ŝiaj palpebroj estas belaj. Li respondis: “Belaj! Sed ne veraj.” Ŝajne, ne eblas plibeligi miajn palpebrojn.

Foje, mi faris al li tre malfacile respondeblan demandon: “Se mi kaj via patrino falus en riveron samtempe, kiun vi savus unue?” Rigardante min, li demandis: “Kiel vi opinias?” ■





S-ano Hu Guozhu

Foto de SUN AIJUN

ĈINAJ E-ISTOJ

Hu Guozhu en Esperantujo

de SUN AIJUN

MENCIANTE Hu Guozhu (Hu Gǔo-gu), niaj legantoj eble memoras lian artikolon kun la titolo "Ni iru la vojon celitan" aper-

intan en nia revuo, n-ro 8, 1994. Li finis sian artikolon per jena poemo:

*Malfacileco, malrapideco
al ni la vojon ne baros.
Sen malhonora malkuraĝeco*

*ni kion povos, ni faros.
Ni paŝo post paŝo, post longa
laboro*

atingos la celon en gloro.
Por atingi la celon li aktivadis en Esperantujo jam 40 jarojn.

EN LEGOĈAMBRO

En la pasinta aŭtuno mi konatiĝis kun s-ro Hu dum la 3-a Ĉina Kongreso de Esperanto okazinta en Chongqing (Ĉongĉing). Li, nealta kaj maldika, aspektis iom pala, tamen kun brilantaj okuloj. Du dikaj manuskriptoj de lia Esperanta traduko de la novelaro "Strangaĵoj de Liaozhai" verkita de Pu Songling (1640-1715), kiujn li montris en la kongreso, vekis grandan eĥon ĉe la kongresanoj. Sur la kovrilo estas la de li desegnita portreto de la aŭtoro Pu Songling. Li diris, ke en lia legoĉambro estas ankaŭ 10 samdikaj manuskriptoj.

Kun respekto kaj scivolemo mi vojaĝis post la kongreso al Huangshi, Hubei-provinco, por viziti lin en lia hejmo. S-ro Hu kaj lia edzino loĝas en brika etaĝdomo en malnova stilo. La 2-ĉambra apartamento estas simple meblita. La ekstera ĉambro servas kiel salono kaj la interna — dormo- kaj legoĉambro. En ĝi staras du grandaj librobretoj, sur kiuj estas ne nur famaj klasikaj ĉinaj romanoj, sed ankaŭ multaj libroj Esperantaj. Sur la tablo apud la lito sidas komputero kaj presilo. S-ro Hu diris al mi: "Mia filo donis al mi tiujn aparatojn. La enspezo de mi kaj mia edzino ne sufiĉas por aĉeti ilin. Antaŭe mi verkis aŭ tradukis manskribojn. Nun mi pretas poluri duafoje mian Esperantan tradukon de 'Strangaĵoj de Liaozhai' per la komputero." Tion dirinte, s-ro Hu prenis de sur librobreto ĉiujn 12 manuskriptojn de Esperanta traduko de "Strangaĵoj de Liaozhai", kiuj enhavas 496 mirrakontojn.

Lia edzino estas tenera kaj silentema. Post kiam s-ro Hu komencis sin okupi pri esperantigo de "Strangaĵoj de Liaozhai" en la 70-aj jaroj, precipe post 1992, kiam li donis sian tutan energion al tiu laboro, ŝi prizorgis lin en la ĉiutaga vivo.

TRAVIVAĴO EN ESPERANTUJO

Sidante sur sofo en la salono de

s-ro Hu, mi aŭskultis lin pri lia travivaĵo en Esperantujo.

"Mi komencis memlerni Esperanton en 1956, kiam mi estis 18-jara, kaj havis la feliĉon ricevi helpon de multaj ĉinaj veteranaj esperantistoj. Ekz., s-ano Honfan letere respondis al mi la demandon: 'Kio estas Esperanto?' kaj sendis al mi Esperantan lernolibron. Liaj afableco kaj malegoismo estigis en mi respekton al esperantistoj kaj faris min senŝanceliĝa en E-lernado. Tri monatojn poste, mi povis skribi en Esperanto kaj tri jarojn poste, aperis en EPC mia Esperanta traduko de ĉinaj popolarakontoj."

Tion dirinte, s-ro Hu prenis sian foto-albumon kaj daŭrigis, montrante al mi la foton, sur kiu estis li kaj s-ano Tikos kun blanka barbo: "Li estas esperantisto, kiu plej imponas al mi. En la malfacilaj jaroj 1966-1976, kiam la ĉina E-movado stagnis, mi dronis en korpremateco kaj malespero. Estis s-ano Tikos, kiu skribis al mi kaj kuraĝigis min. Dank' al lia helpo, mi laboris super la metriko de Esperanta poezio kaj verkis libron pri ĝi."

En lia foto-albumo estis foto de li kaj Wuhan-aj esperantistoj dum la festado de la naskiĝtago de L. L. Zamenhof en la 70-aj jaroj kaj la portreto de Zamenhof en la foto estis desegnita de s-ro Hu. En la albumo iuj fotoj montras, ke li instruas Esperanton sub la verdstela standardo, interparolas kun esperantistoj en somera semajno en Huangshi, partoprenas en la 71-a UK okazinta en Pekino en 1986...

Min ege interesis la foto, sur kiu estis s-roj Hu, Wang Chongfang, Lin Liyuan, Shi Chengtai kaj kvar virinoj, kiujn mi ne konis. S-ro Hu diris kun rideto: "Tiu foto estas rara. En 1988 ni, kvar geedzaj paroj, kolektiĝis en Pekino kaj fotis nin sur la Granda Muro. Kiom mirakla estas Esperanto! Dank' al ĝi, diverslokaj personoj kunvenas sub la verdstela standardo por paco kaj amikeco."

ĈE LA MANĜTABLO

Informiĝinte, ke baldaŭ venos mia naskiĝtago, la edzino de s-ro Hu preparis speciale por mi vermiĉelojn. Ĉe la manĝtablo ŝi diris: "Niaj infanoj laboras aliloke kaj malofte vizitas nin. Ordinare, nur ni ambaŭ estas hejme. Kaj li tuttage laboras ĉe la skribotablo sen paroli dum longa tempo. Hodiaŭ vi alportis al ni gajecon."

S-ro Hu diris ridetante: "Antaŭe ŝi faris ĉiujn domlaborojn kaj mi uzis preskaŭ ĉiujn miajn postlaborajn horojn kaj la ŝparlokitan monon por la Esperanta afero. Kontraŭ tio ŝi neniam plendis. Emeritiĝinte, mi volus akompani ŝin en televidado kaj sportado, tamen mi neniam povas disiĝi de Esperanto."

"Ni ambaŭ laboras en koton-teksa fabriko, kies ekonomia efiko nun estas nebona. Post operacio de la stomako li bezonas tonikaĵon. Tio postulas de ni monon," sin intermetis s-ino Hu.

"Mono estas problemo ĉagrena. Ofte okazas, ke mi ne povas partopreni E-aktivadojn en aliaj provincoj pro manko de mono. Dank' al monhelpo de miaj amikoj, mi sukcesis vojaĝi al Chongqing por la kongreso. De la lastaj jaroj mi dediĉas mian energion al verkado kaj tradukado. Nun mi planas Esperantigi la novelaron 'Anekdotoj de Tang-dinastio' kaj aliajn novelojn de Ĉinio, el kiuj iuj aperis en 'Penso' kaj aliaj Esperantaj eldonaĵoj. Mi planas ankaŭ kompili du poemarojn kaj skribi 'rememoraĵojn sub la titolo Verdaj Spuroj pri neforgesebla amikeco inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj."

Kiam mi adiaŭis la geedzojn, pluvetis. S-ro Hu estis akompananta min al la aŭtostacio. Paŝante sur asfaltita strato plena de platanaj folioj, s-ro Hu diris, montrante la lagon ĉe la ekstremo de la strato: "Ĉiumatene mi ekzercas min per kureto kaj Tajĝiĉjŭan-o borde de ĝi. Poste, mi eklaboras en serena animstato."



Hu Guozhu gvidas la 3-an paroladan konkurson en Huangshi, 1984.



Hu Guozhu (maldekstre) kaj veterana e-isto Zensto en 1984

Tradukoj de Hu Guozhu
Foto de SUN AIJUN





Alilanda e-isto gastas ĉe Hu Guozhu.



Hu Guozhu kaj alilandaj sam-ideanoj en Wuhan

Hu Guozhu (la unua de dekstre), kontribuanto de la revuo "Penseo", kaj aliaj laborantoj de la redakcio
Foto de SUN AIJUN



SURĈEVALE EN EDZECON

de MARIA WENZEL (Kanado)

DENOVE la krioj de la pavo kaj pavino vekis min. Ili havis siajn terenojn sur la kultivata herbtapiŝo en unu kafplantejo en Gvatemalo.

Rigardante la altan kupolon de la moskitreto, kiu ĉirkaŭis la liton, mi rememoris mian unuan matenon en la tropika lando. Mi vidis grandan insekton en la enfermitaĵo. Ĝi tre timigis min kaj rapide mi eksaltis el la lito.

Nun, du monatojn poste, mi ne plu timis la flugantajn kaj rampantajn bestetojn.

Mi estis veninta de Filadelfio por esti certa, ĉu mi ŝatos la vivon en ĉi tiu lando. Jam de longe mi volis loĝi en la kamparo. Nun mi havis la okazon edziniĝi al belaspekta viro kaj mi decidis resti.

Antaŭ du jaroj mi fianĉiniĝis al Walter Wenzel en la Atlantika Urbo, Usono kaj ni korespondis tre ofte.

Estis la deksesma de majo, la tago de nia edziĝ-festo, kaj mia koro estis plena de feliĉo.

En la spegulo mi vidis blondharan junulinon kun du brile grizaj irisoj. Ŝi estis tre bone vestita per bela rozrobo.

Mi forlasis la gastodomon. Ekstere la suno brilis, la floroj bonodoris. Sur la verda herbtapiŝo mi promenis al la biendomo.

Niaj gegastigantoj kaj geamikoj estis Carmen kaj Petro. Walter kaj Petro sidis ĉe la tablo en la mangoĉambro kaj matenmanĝis.

Post la salutoj, Petro demandis min: "Ĉu vi vere volas edziniĝi hodiaŭ?" Mi respondis: "Oh' jes, kial ne?"

Petro klarigis al mi, ke ni ne povas geedziĝi tiun tagon, ĉar la ŝoseo al la urbo Escuintla estas detruita. Dum la nokto pluvegis en la altaj regionoj de la montoj. Tio surprizis min. "Ĉu vi parolas serioze?" Mi ne volis kredi lin, tamen li pravis.

La rivero Guacalate estis nun riverego. La ponto, kiu etendiĝis de unu bordo al la alia, ne estis super rivero. Ĝi estis sur la lando. La rivero inundis la ŝoseon.

Carmen alvenis kaj ni diskutis pri la afero. Petro pensis rapidege kaj tuj sendis du vakerojn kun kvar ĉevaloj al la rivero. Walter telefonis al la civila registrejo en Escuintla, ke ni venos, sed pli malfrue. Li ankaŭ mendis taksion de Escuintla ĝis la rivero Guacalate. "Nun ni devas ŝanĝi vestojn por ĉevalrajdi," diris Carmen.

Ni veturis per aŭtomobilo al la rivero. La vakeroj atendis nin. Mi sidigis min sur la blanka ĉevalo, la aliaj sur la brunaj. La rajdado tra la rivero ne estis tre agrabla. Mi estis sidanta sur milita selo, kiu havis truon en la centro. Ĝi bone taŭgis por soldat-rajdisto, kies metio estas rajdi... sed ne por delikata junulino. Oni ne metis "mian" selon.

Nenia taksio atendis ĉe la alia bordo kaj ni devis rajdi laŭ la vojo. Post iom da tempo ni vidis grandan arbon sur la ŝoseo kaj la taksion malantaŭ ĝi.

Nelonge poste, ni alvenis al la registrejo. Antaŭ la urbodomo ni renkontis la du fianĉamikojn, kiuj loĝis en Escuintla.

Ni eniris la grandan, ne belan nek helan ĉambron. Du horojn la registristo estis atendanta. Li leviĝis kaj post la salutoj li formis duoncirklon el ni ses personoj. Li komencis paroli tre rapide hispanlingve. Mi nur komprenis kelkajn vortojn, ĉar mi ankoraŭ ne fluparolis la lingvon.

Antaŭe ni aranĝis kun Petro, kiu staris dekstre de mi, kiam mi devis diri "si" (jes) ke li donas al mia brako malgrandan puŝon!

Dum la parolado, la oficisto rigardis ĉiam Carmen kaj Walter. Li prenis ŝin por la fianĉino, ĉar Carmen aŭskultis kun pli da atento ol mi. Ŝi komprenis! Kiam mi diris "si", la registristo estis tre surprizita. La aliaj konvinkis lin, ke mi estas vere la fianĉino!

Neniu estis pensinta alporti fotografilon. Do, mi provas pentri bildon per vortoj.

Imagu! Tropika pejzaĝo! La du bordoj plenaj de abunda, verda kaj pitoreska flaŭro. La rivero estis larĝa, sed malprofunda kaj rapidfluantata, portanta grandajn ŝtonojn, arbojn, branĉojn,

malgrandajn bestojn, ktp.

Mi ŝanĝis la selon kaj sidis nun pli komforte sur la ĉevalo. La nova edzo estis aĉetinta funton da butero, kiu estis pakita en bananfolio kaj li portis ĝin en la mano. La vakeroj transportis la donacojn de la fianĉamikoj. Unu portis grandan paketon enhavantan matenmanĝilaron kaj la alia belan florkorbon kun alta prenilo. La leterportisto portis la grandan edziĝkukon en stabila skatolo. Ĝi alvenis el la ĉefurbo Guatemalo. Ni ĉevalrajdis tra la rivero, tre bele aspektante.

Ĉe la alia bordo la aŭtomobilo atendis. Ni veturis kelkajn kilometrojn. Subite granda terŝoviĝo fermis la vojon. Ni komencis ridi... elaŭtomobiliĝis kaj sur iomete da vojo ni povis ĉirkaŭpromeni la terŝoviĝon. Nun, ni piediris kun bona humoro... Post 10 aŭ 15 minutoj la malnova, dua aŭto de la plantejo aperis en la distanco. Oni aŭdis tie pri la terŝoviĝo. La lastaj kvin kilometroj pasis sen interrompo. Fine ni atingis la enveturon. Tuj komencis la bruo de la artfairaĵo, kiu ĉiam estas la festsigno en Guatemalo. Kelkajn minutojn post nia reveno denove pluvis torente. La geamikoj, kiuj estis invititaj, kaj la pastro informis nin per telefono, ke la ŝoseoj detruigis kaj ne estas eble veturi al la plantejo.

Do, la du paroj da geedzoj, Carmen kaj Petro, Walter kaj Maria, festmanĝis solaj. Poste ni distribuis la restaĵon de la kuko inter la plantejinfanoj.

Walter kaj mi ne povis havi mielmonaton en Quetzaltenango. Ni enloĝiĝis en nia domo sub altaj reĝaj palmoj en granda ĝardeno. Komenciĝis bona, feliĉa kaj longa edzeco! ■

KONFESO

de O.VASILJEV (Rusio)

Mirakla lando en la mondo
Sterniĝas larĝe oriente,
Kaj grizaj oceanaj ondoj
Karesas grandan kontinenton.

Antikva lando, ĝi donacis
Al la homaro la inventojn,
Kaj dum longegaj miloj jaroj
Ĉinio estis kiel legendo.

Kaj nun "El Popola Ĉinio"
Nur ĵus ĝi festis jubileon
Mi Vin gratulas, redakcio,
Kaj estu blua, la ĉielo.

Sur paĝoj de monatgazeto
Diversajn trovas ni legendojn,
Vojaĝas ni en granda lando,
Tre, tre feliĉaj kaj kontentaj.

Ni legis pri la konstruaĵoj,
Pri disvolviĝo de Ĉinio,
Amikoj de diversaj aĝoj,
Tre dankas ni la redakcion.

Kaj ni esperas, ke legantoj
Vizitos la miraklan landon,
Ekvidos tie vidindaĵojn,
Karesos belajn bestojn pandojn.

Ni nepre kredas, ke ni trovos
Fidelajn korespondamikojn,
Nin proksimigas Esperanto,
Kaj ĝi nin ligis tre fortike.

(Daŭrigo de p. 16)

Krom la supre diritaj sistemoj, troviĝas ankaŭ kelkaj aliaj, pli aŭ malpli oportunaj. Tamen la sistemo WBZX estas plej vaste uzata, kaj lerta tajpisto per tiu sistemo povas tajpi ĉ. 300 ideogramojn en unu minuto, kiuj povas enteni informon komunikeblan per almenaŭ 1 500 Esperantaj literoj.

Eble vi scias, ke lerta tajpisto ĝenerale povas tajpi nur ĉ. 300 literojn en unu minuto, kiel do oni povas tajpi tiom da ideogramoj en sama tempodaŭro? Ĉar WUZX ebligas ne nur tajpi 650 plej ofte uzatajn ideogramojn per po unu aŭ du klavofrapoj, kaj 4 400 ofte uzatajn ideogramojn per po 3 klavofrapoj, sed ankaŭ tajpi vortgrupojn per nur po 4 klavofrapoj. Ekzemple, oni povas tajpi la vortogrupon 科学技术 (scienco kaj tekniko) per frapo de la klavoj TIRS, tajpi 中华人民共和国 (Ĉina Popola Respubliko) per KQQL kaj tajpi 全国人民代表大会 (Tutlanda Popola Kongreso) per WLWW.

Nun oni ankoraŭ klopodas por trovi pli bonan solvon de la problemo. Ekz. sistemo inventita de s-ro Zheng Yili estas multe pli facile ellernebla kaj pli oportuna, kvankam ĝi ankoraŭ ne tiel populariĝis kiel WBZX. La klavaro por ĉiu sistemo estas jam difinita, kaj pluraj sistemoj estas samtempe instalataj al la komputiloj, ke la uzantoj povu elekti el ili laŭ sia sperto kaj lerto. ■

ESP-NOVAĴOJ

● La 27-an de junio 1996 la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Aliaj Landoj kaj la Pekina Normala Universitato kune okazigis en Pekino ceremonion por la unuataga distribuo de albumo "Chu Tunan — Esploristo trans Jarcento" (nova eldono). S-ro Chu Tunan (1899-1994), fama ĉina socia aktivulo kaj erudiciulo, energie propagandis kaj disvastigis Esperanton dum sia tuta vivo. En la albumo kolektiĝas liaj 377 fotoj faritaj de la juneco ĝis la 90-aj jaroj. La ceremonion prezidis s-ro Chen Haosu, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Aliaj Landoj kaj tiu de la Societo "Amikoj de Esperanto". En la ceremonio donis vortojn ĉinaj esperantistoj kaj alirondaj personoj.

● La 8-an kaj 9-an de junio la Dandong-a E-Asocio de Liaoning-provinco okazigis '96 Someran Programon en Dandong ĉe bordo de Yalu-rivero, kiu konsistis el laborkunveno, prelego, kunsido, ekskurso, amuzado k.a. Ĝin partoprenis pli ol 40 esperantistoj. (Ma Fengchen)



Geesperantistoj en la somera programo

● La 15-an de junio fondiĝis la Esperanta Esplora Centro en Shijiazhuang (Ŝigjaĝuang), ĉefurbo de Hebei-provinco, dank' al la iniciato de la Pedagogia Instituto sub la Hebei-a Normala Universitato. Ĝia tasko estas esplori kune kun diverslandaj esperantologoj la fonetikon, gramatikon, historion, perspektivon, leĝon kaj uzon de Esperanto. La centro esperas, ke diverslandaj esperantistoj kaj esperantologoj sendos al ĝi koncernajn disertaĵojn. Adr: s-ro Shi Yongning, Gongwai, Shida, Shijiazhuang, CN-050016, Ĉinio. (Shi Yongning)

● De la 6-a de marto ĝis la 3-a de majo s-ro Han Zuwu, vicprezidanto de la Tianjin(Tjanĝin)-a E-Asocio, vizitis Ukrainon. Li kunsidis kun estraranoj de la Ukraina E-Asocio kaj membroj de la Kieva E-Klubo, dume ili interŝanĝis opiniojn pri E-Movado. Li partoprenis ankaŭ lokan Esperantan aktivadon.

● La 30-an de aprilo Wang Renhu (Ŭang Ĵenhu), prezidanto de la Liaoning-a E-Asocio, sukcese trapa-

sinte ekzamenojn de la ŝtato kaj ricevinte la licencon, oficiale ekfunkciigis esperantistan individuan radio-stacion. (Liaoning-a E-Asocio)

● Eldoniĝis la dua volumo de "Printempa Kam-po", redaktita de s-ro Shao Rong, profesoro de la Dalian-a Politeknika Universitato de Liaoning-provinco. En ĝi legiĝas disertaĵoj pri Esperantaj terminoj, E-instruaj metodoj kaj uzo de Esperantaj prepozicioj. (Liaoning-a E-Asocio)

● La Xinxiang-a Pedagogia Kolegio de Henan-provinco funkciigis E-kurson en du klasoj de sia fremdlingva fakultato. 70 studentoj lernas du horojn ĉiusemajne en la kurso, kiun gvidas prof. Wang Xiaosi. (Han Daoyi)

● La 13-an de marto la Longxi-a E-Asocio de Boluo-gubernio de la urbo Huizhou, Guangdong-provinco, okazigis sian jarkunvenon. Ĝi deziras interkomunikigi kun en- kaj eksterlandaj esperantistoj. Adr: Meng Qingyuan al Longxi-a E-Asocio, Longxi Lizhong, Boluoxian, Huizhoushi, Guangdong, Ĉinio CN-516121.

● Maje de 1996 la Wugang-a Kredita Kooperativo de Henan-provinco decidis monhelpi al la Pingdingshan-a E-Asocio organizi diversajn aktivadojn, opiniante, ke tio havas grandan signifon. Por rekompenci la helpon, la asocio kulturos esperantistojn por la kooperativo. (Guo Minchang)

● En la 2-a, 6-a, 12-a kaj 18-a de majo la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis respektive poŝtmarkoseriojn "La Cikaso", "La Antikvaj Konstruoj", "La Ruino de Hemudu" kaj poŝtmark-blokon "La 9-a Azia Internacia Filatela Ekspoz-



Memorigaj stampiloj desegnitaj de Zhang Linrui

icio en Ĉinio". La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisijaj tagoj memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui (Ĝang Linfuj).



Partoprenantoj de la simpozio Rilathistorio inter Japanio kaj Koreio

- Seula Klubo (Koreio) kaj E-grupo por Komuna Lernolibro pri Historio (Japanio) kune okazigis la simpozion "Rilathistorio inter Japanio kaj Koreio" en la 26-a kaj la 27-a de aprilo 1996. Choe Taesok prezidis la simpozion, kiu daŭris 12 horojn kun prelegoj. Entute 32 (12 el Japanio kaj 20 el Koreio) partoprenis en la simpozio. La partoprenantaron konsistigis ĉiu aĝodekulo de la 20-a ĝis la 80-a. Inter ili estis du japanaj koreoj kaj unu kanadano. Ili profesias kiel universitataj profesoroj, advokatoj, historiaj instruistoj, studentoj, dommastrinoj kaj oficistoj. Amikeplena etoso akompanis la tutan simpozion. (Kim Uson)

- La 21-an de marto 1996 komenciĝis la unuan fojon oficiala baza kurso en la Lernejo de Modernaj Lingvoj de la Metropolitana Universitato de Karakaso. Oni ofertis Esperanton kiel "elektebla studobjekto" proponitan de la "Gestudenta Centro" kaj akceptitan de la estraro de la lernejo. La kurso trihora semajne, gvidata de prof. Johano Negrete, havis 28 enskribitajn studentojn kaj daŭris ĝis la 11-a de julio. Inter aliaj lerniloj, unuafoje en Venezuelo, estas uzata la televida kurso Mazi en Gondolando, kiu estas tre ŝatata de la studentaro. (J. E. Bachrich)

- Kvar monatojn post la elekto de la nova estraro, Akademio de Esperanto kompletigis siajn rangojn elektante per sekreta voĉdono la direktorojn de la Sekcioj kaj Komisionoj.

Post la kompletigo de la strukturo, la akademia potenco ekefikis. La sekcioj estas al la dispono de la tuta esperantistaro por pritrakti demandojn kaj konsideri sugestojn. Kelkaj projektoj estas prilaborataj, interalie nova internacia publika kolokvo. Sed por esti efika, la laboro de la akademio bezonas financan subtenon: societoj kaj privatuloj povas adresi sian

helpon al la pck 23-20788-6 en Svislando, aŭ al la UEA-konto akad-s, ambaŭ je la nomo de Akademio de Esperanto. (Perla Ari Martinelli)

- Septembre de 1995 Aŭvida Centro de Sarlanda E-Ligo faris en Blieskastel aŭvidan dokumenton pri Ivo Lapenna. La tri videbendoj, kiuj ampleksas dek du horojn, estas riceveblaj en ĉiuj kolorsistemoj de la mondo: PAL, SECAM (por Francio), MESECAM (por orientaj landoj), NTSC (por Usono, parte Sudameriko, Japanio, Koreio), PAL-M (por Brazilo), PAL-N (por Argentino). Prezo: 200 DEM (220 guldenoj). Pagoj akceptigas pere de la konto gbec-W ĉe UEA aŭ sendendaj al la germana poŝtbanka konto 91535-663 (Gunther Becker), poŝta banko Saarbrucken (banka kodo 590 100 66). Eblas ankaŭ ricevi 9-horan kurson pri Retoriko 100 DEM sur sonkasedoj kaj simile intervjuon pri la lingvoscio de Ivo Lapenna 20 DEM, kune kun alia menĉo donace. Adr:

Gunther Becker, Alter Hangarten 2, D-66440 Blieskastel, Germanio. (Gunther Becker)



Anĝelina Taremi prezentas en Esperanto.

- Aprile 1996, laŭ la invito de E-Societo de Ĉikago, Anĝelina Taremi iama motorino de E-movado en Arizona, Usono, tien vojaĝis por televide intervjuigi kiel esperantista gasto. Ŝi prezentis ankaŭ Esperantan programon en televida stacio en Ĉikago.

Notindas, ke nuntempe en Ĉikago 4 kanaloj en kabla sistemo elsendadas E-temajn programojn. (Atilla Magjar)

La ĉinaj ideogramoj en komputado

de LI SHIJUN

Mi ŝatas teknikajn artikolojn, ekz. "Komputeroj en Ĉinio". Kiel estas la klavaro de la ĉina skribmaŝino? Ĉu jam estas normigita klavaro? Bonvolu sendi al mi skizon aŭ desegnon.

LA klavaro de la ĉina komputero estas tute sama kiel tiu cirkulata internacie kaj estas facile per ĝi tajpi latinajn literojn. La ĉina skriba lingvo konsistas el dekmiloj da ideogramoj, kiuj estas malsamaj en formo. Kiamaniere do oni povas komputadi per ili uzante la malmultajn klavojn de komputilo?

Tiun problemon oni solvas en nia lando diversmaniere.

a. Oni povas uzi telegrafian kodon por ĉinaj ideogramoj. La plej ofte uzata kodo estas tiu, en kiu la ideogramoj estas reprezentataj per po 4 arabaj ciferoj. Ekz. 0001 reprezentas la ideogramon 一, 0086 — 人, 1557— 川. Alia sistemo reprezentas ideogramojn per po 3 latinaj literoj. Ekz. 一 estas reprezentata de AAB, 人 — ADI, 川 — CHX. Por uzi tiujn sistemojn, oni devas memori la ciferaĵojn aŭ literajn signojn por miloj da ideogramoj. Tiuj solvoj estas akcepteblaj por profesiaj telegrafistoj, sed ne por ordinaraj uzantoj de komputilo.

b. Oni povas uzi latinajn literojn por reprezenti la ideogramojn laŭ la oficiala latiniga sistemo. Ekz. yi (ji) reprezentas 一, ren (jen) — 人 kaj chuan (ĉuan) — 川. Tiu sistemo estas pli facile uzebla, ĉar oni ne bezonas parkere memori la kodon; ĉiu, kiu bone scias la prononcon de la vortoj, povas facile ĝin uzi. Sed en la ĉina lingvo ekzistas multaj dialektoj, tial multaj el la ĉinoj ne bone scias la oficialan elparolon de la vortoj. Por ĝuste literumi la latinigitajn ideogramojn, oni devas sin helpi per vortaro. Kaj cetere, en la ĉina lingvo ekzistas multaj homofonoj. Ekz. ĉiuj jenaj vortoj prononciĝas kiel — (ji): 壹, 医, 揖, 铤, 依, 伊, 衣. Oni

RUBEN LUIS SANCHEZ (Argentino)

devas unue aperigi ĉiujn tiujn ideogramojn en tabelo piede de la ekrano kaj poste elekti el ĝi la deziratan. Tiu komplika procedo malrapidigas la komputadon.

c. Por trovi pli bonan solvon oni analizis la ideogramojn kaj konstatis, ke la strekoj de la ideogramoj estas klasifikeblaj en 5 kategorioj, nome: 1. horizontala streko 一, 2. vertikala streko |, 3. maldekstren etendiĝa oblikva streko 丿, 4. punkto 丶 (inkluzive de dekstren etendiĝa oblikva streko 丶), 5. akutangula streko ㄥ. Aldone al tiuj 5 fundamentaj kategorioj oni metis ankaŭ fundamentajn elementojn de ideogramoj kiel ekz. 十, 土, 王, 寸, 雨, 卜, 目, 日, 口, 田, 门, 人, 金, 月, 白, 禾, 言, 立, 火, 冫, 了, 女, 又, 彡 ktp. laŭ la kategorio de la unua streko de tiuj kombinaĵoj de strekoj. Ekzemple, 十, 土, 王, 寸, 雨 komenciĝas per horizontala streko 一; ili do apartenas al la streko-grupo 卜, 目, 日, 口, 田, 冫 komenciĝas per streko |; 人, 金, 月, 白, 禾 komenciĝas per streko 丿; 言, 立, 火, 冫 komenciĝas per punkto 丶; 了, 女, 又, 彡 komenciĝas per akutangula streko ㄥ, do ili apartenas al la streko-grupo de akutangula streko. Laŭ tiu principo oni dividis la strekojn kaj elementojn de ideogramoj en kvin grupojn. Kaj tiun sistemon oni nomas *Wu Bi Zi Xing* (WBZX kvinstreka sistemo). Oni lokis tiujn 5 grupojn de strekoj kaj elementoj sur po 5 klavojn. Se nur oni memoras tiujn 25 klavojn, oni povas facile tajpi ĉinajn ideogramojn per la ordinara klavaro.

(Daurigo sur p. 13)

Vizito al maizlando

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de ZHAO XI



CINIO kun multa loĝantaro kaj malmulta agraro fundamente solvis la problemon de manĝaĵoj por siaj 1.2 miliardoj da loĝantoj.

Sed la loĝantoj de Ĉinio daŭre plimultiĝas. Ĉu la limigita agraro povos produkti pli da greno por vivteni la ĉiam kreskantan loĝantaron? Por doni pozitivan respondon Ĉinio alte taksas la disvolvigon de agrikulturo. La ĉinaj kamparanoj faras ĉion eblan por protekti kaj reformi kampojn kun la celo pliprodukti grenon. Antaŭ nelonge mi oficvojaĝis en la provinco Jilin (Ĝjilin), alinome, maizlando, kaj vidis, ke la tieaj kamparanoj, aplikante sciencan kaj teknikon, serĉas novan vojon por pligrandigi grenproduktokvanton.

SCIENCA KULTURADO DE KAMPOJ

Same kiel en multaj aliaj lokoj de Ĉinio, ankaŭ en Jilin la kamparanoj profitis el popularigo de agrikulturaj teknikoj. Agrikulturaj teknikistoj estis bonvenigataj de la kamparanoj. En morta sezono de kampla-

Specialigita bredisto de bovoj



boroj nemalmultaj kamparanoj sendas siajn gefilojn lerni en agrikultur-teknika stacio. Antaŭ ol projekciigas rakontaj filmoj, la kamparanoj petas aldone projekcii agrikulturajn scienc-teknikajn filmojn. En 1995, en la provinco proksimume kvar milionoj da kamparanoj vizitis kursojn pri kulturado de bonspeciaj semoj, plantado, kultivado, sterkado, mortigo de fiinsektoj, prevento kaj likvido de epizootio de kortaj birdoj kaj bestoj kaj agrikultura mekanizo. Rezulte de tio, preskaŭ ĉiu kamparana familio havas agrikulturan teknikiston. Krome, la kamparanoj fondis teknikajn asociojn kun 120 000 membroj. 60 000 kamparanoj ricevis profesian titolon.

Foje, mi preterveturis maizkampon ĉirkaŭitan de forstoreto. Rimarkinte, ke iu mezaĝa kamparano sidas ĉe kamprando, mi elaŭtigis kaj ekbabilis kun li, cele scii, ĉu li estas lerta en kampokulturado.

“Kiamaniere kulturi tiun ĉi maizkampon?”

“Maizo kaj tritiko kulturiĝas en skalo de 4:1,” respondis kamparano Xu Jinghe (Ŝju Ĝinghe).

Mi trovis, ke sur la vasta kampo maizidoj sane kreskas kun tritikidoj sur ĉiu kvina linio.

“Kian avantaĝon havas tia kulturado?”


“Tio donas sufiĉan ventoladon al la kampo, ke maizo estu produktiva. La produktokvanto de kvar linioj da maizo egalas al tiu de kvin linioj.”

“Vi estas kapablulo tiuflanke, ĉu?”

“Ne, ne! Kleraj junuloj estas pli kapablaj ol mi.”

Mi demandis lin pri scienca kulturado de kampoj. Ekster mia atendo, li konigis al mi multajn metodojn de scienca kulturado, kiaj mortigo de maizpiralidoj per hidrarga lampo, mortigo de fiinsektoj per insektoj, medikamenta sarkado kaj laŭgrunda sterkado.

Li diris al mi, ke la ĉefa fiinsekto, kiu detruas kreskadon de maizo, estas piralido. Antaŭ la 90-aj



Antaŭ enstokiĝo

Foto de **SUN YAHAI**



"Novaj muroj" en kamparana korto

Foto de **SUN YAHAI**



Por stoki grenon

Sur vojo de gren-transportado



jaroj la kamparanoj ĝenerale uzis insekticidon. Sed post longtempa uzado piralidoj ekhavis drogreziston, eĉ en ujo kun insekticido ili ne mortis tuj. En la lastaj jaroj la kamparanoj ellernis mortigi maizpiralidojn per hidrarga lampo: konstrui cementan cisternon ĉe la kampo kaj plenigi ĝin per akvo, nokte pendigi hidrargan lampon super la cisterno, kaj tiam piralidoj svarme sin ĵetas al lampombro en la akvo kaj dronas en la akvo. Iuj kamparanoj sukcese mortigis maizpiralidojn ankaŭ per trihogramo (*Trichogramma evanescens*).

En la provinco Jilin populariĝis scienca kulturado de kampoj. Rezulte de tio, la totala produktokvanto de du milionoj da hektaroj da maizo superis 20 miliardojn da kilogramoj en 1995, sed en 1986 ĝi estis 14 miliardoj da kilogramoj. La hektara produktokvanto atingis 9 000 kilogramojn.

GRANDA PROFITO EL TERKULTURADO

Nia aŭto kuris rapide sur pado. Ambaŭflanke de ĝi estis cilindraj grenejoj. Ĉiu grenejo povas enteni ĉirkaŭ 100 milionojn da kilogramoj da greno. En la lastaj jaroj sinsekvigis riĉa rikolto de greno, sekve mankis grenejoj. Lokanoj diris al mi, ke post rikoltado ekster grenejoj staris en longaj vicoj aŭtoj kaj ĉevalĉaroj kun vendota greno. La ŝoforo diris al mi: "Nun grenejoj troviĝas ankaŭ en la domoj de kamparanoj. Nemalmultaj familioj havas grenon sufiĉan por du-tri jaroj."

Mi vidis, ke en liberaj ĉambroj de nemalmultaj kamparanaj familioj stakiĝas sakoj plenaj de tritiko kaj rizo. Eĉ en kortoj, sur arbobranĉoj kaj muroj pendis maizspikoj.

La familio de Xu Jinghe havas ses membrojn. Ili laŭkontrakte kulturas du hektarojn da kampoj. En 1995 ili rikoltis sume 18 000 kilogramojn da maizo, rizo kaj tritiko kaj enspezis nete 20 000 juanojn, pli multe ol tiu de urbanoj.

"Kiom vi elspezas jare?"

"Malmultas la elspezo. Ni konsumas grenon, legomojn kaj hejtajon produktitajn de ni mem. Manĝoleo estas interŝanĝe akirita per sojfaboj. La akiritan monon ni uzis ĉefe por konstrui domon, aĉeti traktoron, maizdisgrajnigilon kaj iujn vivbezonaĵojn."

"Ĉu via enspezo estas la plej alta en la vilaĝo?"

"Ne. Nur mezgrada," diris Xu Jinghe. Tie 80% da kampoj estas destinitaj por maizo. La kulmoj estas disrompitaj por nutri bovojn. La vilaĝanoj bredas ĝenerale plurajn bovojn. En la najbara vilaĝo estas maljunulo, kiu bredas pli ol 100 bovojn. Dank' al bovobredado, la kamparanoj ne nur akiras monon, sed ankaŭ plialtigas grenproduktokvanton per bovfekaĵsterkado.

ORA ESPERO

Junie, en la kamparon de Jilin ankoraŭ ne venis rikolta sezono, tamen mi rimarkis, ke ĉe ŝoseo staras duonkilometre longa vico da aŭtoj kun greno vendota. Mi informiĝis, ke iu granda kokobreda kaj prilabora

kompanio aĉetas maizon kaj sojfabojn per prezo iom pli alta ol tiu difinita de la ŝtato.

La kompanio estis fondita en 1989 kune de la urbo Dehui de la provinco kaj la Tajlandaj Grupo-Kompanioj de Chinatai. Respondeculo de la kompanio diris al mi: Antaŭe en la urbo, se oni bredis kvar milionojn da kokoj, do oni ne povis forvendi ilin. En 1995 oni bredis 13 milionojn da kokoj. En la urbo estis sume 1 100 kokobredaj familioj kaj ĉiu familio enspezis 12 000 juanojn el kokobredado. La kompanio ĉiujare konsumas 120 000 tunojn da maizo kaj 80 000 tunojn da sojfaboj.

Antaŭe en Ĉinio, granda agrikultura provinco kulture estis finance malriĉa. Tia estis ankaŭ la provinco Jilin. Sed hodiaŭ ŝanĝiĝas tiu stato. Unuflanke, la kamparanoj, helpe de scienca kampokulturado, produktas altproduktan kaj bonkvalitan grenon, aliflanke, iuj prilaboraj entreprenoj rolas kiel ponto de produktado kaj vendado inter la merkato kaj dise entreprenantaj kamparanaj familioj. Oni povas diri, ke tio donas ŝancon de riĉiĝo al la kamparanoj kaj alportas esperon de ekonomia prosperigo al la granda agrikultura provinco Jilin. ■

Nekrologoj

Pola veterana Esperantisto Stanislaw Winnicki forpasis en aprilo 1996. S-ro Winnicki estis tre aktiva en la loka E-klubo. Li agis fervore en E-movado jam de prekaŭ 40 jaroj, kiel radio-oficiro sur la ŝipo "Zamenhof" navigante al Malproksima Oriento 22-foje. En la klubejo liaj rakontoj pri eksterlandaj vojaĝoj ĉiam allogis ankaŭ neesperantistojn. Li donacis al ĉiujaraj ekspozicioj okaze de la Zamenhofa Festo diverslandajn lernolibrojn kaj presaĵojn. Li ankaŭ estis leganto de EPC. En 1990 li ricevis trian premion en la konkurso "Mi kaj Ĉinio".

Veterana esperantisto Chen Baode forpasis en la 13-a de majo 1996. Li naskiĝis en 1917 kaj esperantiĝis en 1932. Kiam fondiĝis la Esperanto-Asocio de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en 1979, li estis elektita kiel vicprezidanto de ĝia konsilantaro. En la 3-a Ĉina Kongreso de Esperanto okazinta en oktobro 1995 li estis elektita kiel honora komitatano de la Ĉina Esperanto-Ligo. Li ĉiam aktive propagandis Esperanton kaj partoprenis Esperantajn aktivadojn. Li organizis kompiladon de Esperantaj libroj kaj revuoj, iniciatis Esperantan instruadon kaj faris grandan kontribuon al la E-movado de la Interna Mongolio.

SUN AIJUN:

Vizito al Diaocha-lago



Varmodomo de ĥelonioj ĉe la lago

SOMERE en pluva tago mi venis al Diaocha-lago. Tra la verdaj arboj ambaŭflanke de la ŝoseo mi vidis senliman lagon kviete kuŝantan kaj vualitan de maldensa nebulo. Atinginte ĝin, mi trovis, ke de tempo al tempo fiŝoj elsaltis el akvo kaj rulis ondojn trembrilajn sur la akvo. En la lago, 16 km longa kaj 6 km larĝa, brediĝas 25 specioj da akvoproduktaĵoj, kiaj karpoj nigraj, herbovoraj kaj blankaj, grandkapaj fiŝoj, ĥelonioj, kraboj kaj mugiloj. La tieaj lotusoj kaj perloj estas famaj tra la tuta lando.

Diaocha-lago estas la unika fiŝbreda eksperimentejo de Ĉinio. Ĝi kuŝas en Hanchuan-gubernio de Hubei-provinco, Ĉinio, je 50 km de Wuhan, ĉefurbo de la provinco. Antaŭ 30 jaroj tie ofte okazis inundo. En la 70-aj jaroj oni komencis ordigi la lagon, al kiu etendiĝis neniuj vojoj. Nun ĉirkaŭ la lago ne nur konstruiĝis ŝoseoj kondukantaj al ĉiuj vilaĝoj de la regiono, sed ankaŭ funkcias 35-kilovolta transformatora substacio, programregaj telefonoj kaj televida transsenda stacio. Plej laŭdinde estas, ke en la lago-regiono konstruiĝis akvoproviza kaj akvodrena sistemoj: Kvar trunkaj kanaloj kun larĝo de 220 m kaj totala longo de 44 km kiel smeraldaj rubandoj inkrustiĝas ĉirkaŭe de la lago; en la lago formiĝis reto el bonorde interkruciĝantaj dratoj, kaj ĉe ekstremoj de la reto starigis 46 kluzoj kaj pumpstacioj kaj 3 grandiozaj inund-ellasaj kluzoj. Antaŭ nelonge germana fakulo pri fiŝbredado vizitis la lagon kaj laŭdis: "Tia lago estas malofte vidata."

Mi miris, ke nemalmultaj etaĝdomoj estas konstruitaj super la lago, kun originala trajto de akvolando. Mi eniris duetaĝan domon kaj renkontis ĝian mastron, 29-jaran junulon Pan Binglai. Mi informiĝis de li, ke li ekokupis sin pri fiŝbredado en 1986, kiam li diplomitiĝis el supera mezlernejo. Nun li laŭkontrakte luis basenon kun areo de ĉ. 2.7 hektaroj kun jara produktokvanto de 10 000 kg da fiŝoj. Li ĉiujare enspezas 40 000 juanojn (8.3 juanoj

egalas al 1 usona dolaro), dekalkulinte la lupagon kaj imposton. La domo okupas 127 kvadratajn metrojn. Ĝi konstruiĝis en la lasta junio per lia multjara ŝparmono. La domo estas laŭmode dekoriita, kun larĝa kaj hela tualetejo. Mi venis al la balkono, antaŭ miaj okuloj prezentiĝis vasta baseno kaj min karesis freŝa aero. La mastro tamen diris: "La vivnivelo kaj loĝkondiĉo de mia trimembra familio estas ankoraŭ malpli bonaj ol tiuj de iuj aliaj. Ĉi tie oni povas vivi bonhavan vivon, se nur ili diligente laboras."

Por altigi profiton de la akvoriĉfontoj, en la lastaj jaroj oni faris reformadon al ĉ. 666 hektaroj da surfaco de la lago. Oni dividis ĝin en malgrandajn basenojn kaj pli profunde fosis ilin. Samtempe oni energie disvastigis bredadon de famaj, bonrasaj kaj originalaj specioj de akvoproduktaĵoj kaj starigis nombron da fiŝbredaj bazoj altproduktaĵaj, stabilaj kaj profitdonaj. Mi vizitis la nove konstruitan industrian kulturbazon de ĥelonioj, kiu areas 6.66 hektarojn. En ĝia varmodomo pli ol 45 000 ĥeloniidoj sane kreskas en dekoj da cementitaj basenoj. La jara produktovaloro de la kultura bazo de ĥelonioj superis dek milionojn da juanoj, 100-200-oble pli multe ol tiu de la ordinara bredado.

En la regiono de Diaocha-lago jam formiĝis integra sistemo de produktado, provizado kaj vendado. Tie harmonie laboras la kompanioj, produktaj bazoj kaj kamparanaj familioj. En 1995 la laboristoj de kompanioj kaj individuaj fiŝistoj enspezis po 6 000 juanojn, dekoble pli multe ol en 1980.

Lokanoj diris, ke Diaocha-lago abundas je fiŝoj en ĉiuj sezonoj. En aŭtuno tie ĉarmas akvo kaj grasas fiŝoj, oni povas remi, pluki lotus-torusojn, fiŝhoki kaj manĝi akvoproduktaĵojn. Mi venis pli frue kaj ne ĝuis la poezian pejzaĝon de verdaj lotusfolioj kaj aparte ruĝaj lotusfloroj sub la sunradioj, tamen mi ĝuis bongustan ĥeloniaĵon en ĉelaga restoracio. ■

Ekranaro kun pentraĵoj pri la Ruĝdoma Songô

Fotoj de LIU SIGONG

"Ekranaro kun Pentraĵoj pri la Ruĝdoma Songô" estas farita kun inkrustaĵoj de kolorŝtonaj skulptaĵoj surbaze de intrigo de la fama ĉina klasika romano "Ruĝdoma Songô", kiu priskribas la prosperon kaj malprosperon de feŭda familio, kun la amafero inter Jado, Jaspa kaj Ora kiel la ĉefa enhavo.

La ekranaro, 2.3 m alta kaj 70 m longa, el 52 pecoj kun pentraĵoj pri 50 rakontoj de la "Ruĝdoma Songô", estas farita de la Jingyi(Gingji)-a

Skulptaĵa Limigita Kompanio de Zhejiang-(Ĝeĝjang)-provinco en 3 jaroj. Sur la ekranaro prezentigas pli ol 300 homfiguroj, kun riveroj, montoj, pavilonoj, floroj, birdoj kaj mebloj kiel la fono. Por fari ĝin oni uzis 32 kubmetrojn da altkvalita ligno, 3 tunojn da kupro, diverskolorajn ŝtonojn, kiaj jado, heliotropo kaj smeraldo, kaj rarajn ornamaĵojn, kiaj oraĵo, perlo, agato kaj eburo.

La fotoj montras parton de la ekranaro.



Jado eksterdome aŭskultas muzikon ludatan de Jaspa.



Jen alia servoknabino forpelata.




Jado revizitas la loĝejon, kie Jaspas vivis antaŭ sia morto, kaj priploras ŝin.



Jado monaĥiĝis post dekadenciĝo de sia familio.



Jaspas, Korŝira, bruligas siajn manuskriptojn de poemoj.




Jado ŝtele vizitas la servoknabinon, forpelitan el Jia-familio.



Sorcĉa panoramo de la socia vivo

de SHI CHENGTAI



MIRRAKONTOJ DE LIAOZHAI, verkita de Pu Songling (1640-1715), tradukita de Laŭlum, eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, 624 pĝ, 14.5 cm × 21 cm, bindita, 18 USD.

Eble ĉiu ĉino legis iujn pecojn el la novelaro "Mirrakontoj de Liaozhai" de Pu Songling dum sia lernado en mezlernejo; eĉ se li aŭ ŝi estas analfabeto, do, almenaŭ tiu aŭskultis la mirrakontojn rakontitajn de aliaj, aŭ spektis filmojn, adaptaĵojn de liaj noveloj. La mirrakontoj de Pu Songling cirkulas en la ĉina popolo kaj Pu mem fariĝis unu el la plej famaj verkistoj en la ĉina literatura historio. Oni povas kompari lin kun Boccaccio, elstara itala verkisto, kiu verkis novelaron kun eterna vivoforto "Dekamerono" kun 100 rakontoj kaj faris "la plej altan kaj plej ampleksan prozan eventon de la itala mezepoko".* Kaj Pu Songling, post Boccaccio je 300 jaroj, verkis la novelaron "Mirrakontoj de Liaozhai" kun ĉirkaŭ 500 pecoj kaj faris la plej elstaran kaj plej ampleksan prozan eventon de la ĉina klasika literaturo.

Ekde la fino de la lasta jarcento la novelaro "Mirrakontoj de Liaozhai" havas versiojn de 31 lingvoj, ekz. la anglan de Herbert A. Giles, la ĉeĥan de Jaroslav Průšek kaj la germanan de Erich Schmitt. Ekde la 40-aj jaroj s-ano Liu Hongkang prove esperantigis la novelaron, tamen li tradukis nur kelkajn novelojn. Ekde la 70-aj jaroj alia kuraĝa s-ano Guozhu ambicie deziris traduki la plenan kolekton de la novelaro "Mirrakontoj de Liaozhai", ties laboro eĉ daŭris ĝis hodiaŭ. Krom iuj pecoj, ekz. Qing-

feng aŭ f-ino Jiaonan, aperis sur paĝoj de EPC kaj L' Omnibuso, en nia Esp-kulturo bedaŭre mankis volumo de tiu grandioza verko. Finfine, nia akademiano Laŭlum persiste laboris dum kelkaj jaroj kaj esperantigis 86 el la 500 noveloj kaj omaĝis la miran volumon "Mirrakontoj de Liaozhai" al la esperantista publiko.

Pri la vivo kaj verkado de Pu Songling la tradukinto jam sufiĉe skribis en sia enkonduko, do, se mi diros plu ĉi tie, tio ja fariĝos enuiga balasto. Mi preferas tuŝi tion, kio plej profunde impresas min dum legado.

Pu Songling vivis en la frua periodo de Qing-dinastio. Pro la militoj, nacia subpremado, katastrofoj, teruraj impostoj kaj rabadoj la popolanoj vivis en suferoj. Ankaŭ Pu suferis dum la tuta vivo. Li, intelektulo, senĉese partoprenis en la ŝtataj ekzamenoj por enpremi sin en la regantan tavolon, tamen fiaskoj ĉiam akompanis lin, kaj li restis nur inter simplaj vilaĝanoj. Tio donis al li eblecon por funde rigardi la socian vivon per propraj okuloj, kaj li persone spertis la homvivan doloron kaj aspiron. Li per sia peniko skribis novelojn por speguli ampleksan socian panoramon de sia epoko. Precipe la akreco kaj profundeco de lia kritiko kontraŭ la feŭda etiko konturis lian eminentan talenton. Li uzis la plej brilan kaj vervan klasikan ĉinan lingvon (la skriban) en verkado. Ĉu nia Esperanto kapablas transigi aŭtente tian verkon? La respondo estas: Jes! Certe! Laŭlum jam estas bone konata de legantoj pro siaj virtuoza tradukoj el la ĉina literaturo. Lia traduka stilo estas flua,

trafa kaj konciza, tia stilo faciligas vian komprenon kaj ĝuadon dum la legado.

La originalo, samkiel alia majstra verko "Ruĝdoma Sonĝo" en la ĉina literaturo, spegulas abundajn facetojn de la ĉina tradicia kulturo. La tradukinto klopodis klare kaj precize esprimi tian kulturan atmosferon en Esperanto kaj faris detalajn necesajn piednotojn. Rilate la propran fenomenon de la ĉina kulturo, li iniciatis iujn neologismojn, ekz. daĵenon, sunfuon, zongduon pri la burokrat-oficista sistemo; ĝinŝion, ĝuiĵinon, ŝiŭcaĵon pri la ŝtata ekzameno... Du verboj koŭtoi, vigili eble trafas ĝustan ag-signifon...

La tradukinto esperantigis pliparton da amo-rakontoj el la originalo, kiuj priskribas kortuŝan amon inter homoj kaj feinoj, fantomoj, vulpspiritoj, florfeinoj, birdnimfoj, eĉ vermospiritoj k.a. La aŭtoro sukcese reliefigis tiujn figurojn, kaj la traduko ankaŭ vivece kaj verve personigis ilin. Precipe, Laŭlum transigis viglajn dialogojn de diversaj karakteroj.


Krome, por ekspluati la latentan forton de nia lingvo Laŭlum kuraĝe provis sian proponon en la traduko: li uzis kelk, milion kiel numeralon; eĉ sekvante far, li prenis ankaŭ dank, koncern kiel prepozicion. Ĉu lia provado meritas nian konsenton? Nu, respondu tion vi mem.

La volumo estas bele presita, kun 35 ilustraĵoj ĉin-stilaj. Ni esperantistoj fieras antaŭ la monda publiko pro ĝia ekzisto.

* Vd. "Literatura foiro", n-ro 158 (dec./1995), p. 293.

Lignogravuristo Zhou Yunxian

de XU YE



S-ro Zhou Yunxian

SUB agrabla muziko lignogravuristo Zhou Yunxian (Ĝoŭ Junŝjan) estis miksanta farbojn. “Mi faras tion samkiel olepentristo, kiu harmoniigas la kolorojn por atingi plej bonan efekton de vidado,” li diris al mi.

Li faras gravuraĵon sur malpli-ol-du-kvadratmetra balkono. Tage li miksas farbojn kaj nokte faras kolorigadon en kvieteco. Tiamaniere li kreas plurkoloran lignogravuraĵon ĉiutage kaj per sia laboraĵo ree prezentas la apartan ĉarmon de la naturo.

Lignogravuraĵo karakteriziĝas per mirinda grifelado, reliefa surfaco kaj diversa kolorigo. La gravuraĵoj de Zhou distingiĝas ne nur per tia karakterizaĵo, sed ankaŭ per lirikismo. Sur muroj de lia domo kaj sur lia librobretaro pendas ĵus farita lignogravuraĵo “La Kanjono de Nujiang-rivero”.

Ĝi figuras, ke ĉeval-kondukantoj iras ĉe la rivero, super ĝi flugas agloj kaj apud ĝi majestas montpintoj. La lignogravuraĵo artisme prezentas grandan kanjonon en la Oriento kaj ĝian kvietecon.

En Yunnan sudokcidente de Ĉinio, la hejmloko de Zhou Yunxian, abundas karstaj ŝtonarbaroj, kiuj aparte plaĉas al li. En lia verko karsta ŝtonarbaro trovas sian vivecon en la sezonoj, dank’ al malsama grifelado. La lignogravuraĵo “Ŝtonarbaro” estas

strukture bonaranĝita kaj kolore harmonia. S-ro Zhou Yunxian havas grandan amon al sia hejmloko kaj la naturo inspiras lin en kreado. En la pasintaj jaroj li finis la verkojn “Ĉe Lancang-rivero”, “Mateno en Xishuangbanna”, “Ŝtupar-kampo en Luno” kaj “Dianchi-lago en Printempo”, kiuj ĉiuj temas pri moroj en Yunnan. La montoj, riveroj, palmoj kaj taj-aj knabinoj kun bambua ĉapelo kaj en tubforma jupo ĉiuj enkorpigas lian amon al la hejmloko.

En 1990 li alvenis al Tibeto. La lazura ĉielo, blankaj nuboj, temploj kaj loĝdomoj sur la monda tegmento profunde impresis lin kaj donis al li inspiron pri kreado. Reveninte, li faris la lignogravuraĵojn en tute nova stilo, kiaj “Mateno en Tibeto”, “Tagmezo en Tibeto” kaj “Vespero en Tibeto”.

Aŭtune de 1995, li sukcese okazigis en la Ĉina Belarta Domo, Pekino, la ekspozicion de siaj 25 lignogravuraĵoj pri moroj en Yunnan. Ĉiuj ekspoziciaĵoj estis aĉetitaj de la Azia Belarta Domo de Koreio. Poste, li estis petita okazigi ekspozicion en Germanio kaj Usono.


S-ro Zhou Yunxian aĝas pli ol 40 jarojn kaj servas en la Scienc-teknika Halo de Yunnan-provinco kiel profesia artisto. ■






“Budhismaj pagodoj en Xishuangbanna”



"Ŝtupar-kampo en luno"



"Bambuaj domoj de tajoj"



Mia franco- edzino

de ZHOU YIBING



Zhou Yibing kun siaj edzino kaj infano

MI havas vastan intereson kaj multajn ŝatokupojn. Al mi plaĉas historio, literaturo, belarto, muziko, komerco k.a. Cetere, mi estas diligenta, lernema, memfida... Jen kial franca knabino edziniĝis al mi.

Mia edzino nomiĝas Dai Yining en la ĉina lingvo kaj Irène en la franca. En 1992 mi konatiĝis kun ŝi en Guangxi (Güangŝji), Ĉinio. Tiam ŝi, diplomiginte el universitato de Francio, venis en Ĉinion, al kiu ŝi sopiris de longe. Ŝi kaj mi laboris kune en bona kompanio. Ŝi bone parolas en la ĉina lingvo kaj tre ŝatas la kulturon kaj historion de la antikva Ĉinio, kaj ĝuste en tio mi estas forta. Post nelonge ni amikiĝis unu al la alia.

Tri jarojn poste, ni geedziĝis ĉe ŝiaj gepatroj en Orléans, Francio. Mia bopatro diris al siaj amikoj: "Mia bofilo estas ĉino, tamen li konas la francan historion ne malpli multe ol vi ĉiuj." Interese estis, ke foje en Ĉinio lia filino demandis min pri la ĉina historio kaj mi faris ĝustan respondon, kaj aliffoje en Francio mia bopatro demandis min pri francaj historio kaj kulturo. Feliĉe, mi ne malhonoris lin antaŭ siaj amikoj, ĉar mi bone scias la historiojn ĉinan kaj mondan.

Ni pasigis neforgeseblan mielmonaton en Francio. Poste ni revenis en Ĉinion, ĉar mia edzino tion deziris. En la mezo de Pekino ni havas apartamenton el du ĉambroj. Kompare kun ŝia loĝejo en Francio, la nia estas tre malgranda. Tamen ŝi estas kontenta pri ĝi, ĉar en ĝi regas tenereco kaj harmonio. Hejme ni parolas en la ĉina lingvo kaj kelkfoje en la angla.

Mia edzino laboras en usona kompanio en Pekino. Ŝi iras al laboro je la 8-a kaj revenas hejmen je

la 8-a vespere. Nun mi funkciigas amuzejon kaj fabrikon de aŭtaj tegmentoj. El la enspezo mi investas por eldonado kaj ekspluatado de bienoj. Mi estas okupata, tamen mi tre ĝojas fari ion por ŝi, ekz., matene, por ke ŝi dormu iom pli longe, mi ellitiĝas pli frue kaj preparas matenmanĝon; vespere, mi laŭeble ne aranĝas societajn aktivadojn por vespermanĝi kune kun ŝi. Precipe en sabata vespero ni bone preparas pladojn ĉinajn aŭ francajn kaj kune ĝuas ilin en kandellumo, akompanate de agrablaj muzikaĵoj. Ĉe tio mia edzino kantas francajn kantojn, dum mi akompanis ŝin per gitaro. Nun ŝi scipovas kanti la ĉinan kanton "La luno, mia koro". Kelkfoje mi lernigas al ŝi ludi vejĉion. Dimanĉe ni ofte ekskursas kun amikoj en antaŭurbo. Tie ni konkuras pri montogrimpado kaj poste babilas en tetrinkejo sur montodeklivo.

Niaj amikoj envias nian romantikan vivon. En la pasinta novembro naskiĝis nia filino. Unu monaton poste, mia edzino rekomencis labori kiel antaŭe kaj ni konfidis la bebon al infanvartistino. Tiel amante nian filinon, ni multe parolas pri ŝi ĉiuvespere kaj en ferioj ni kunportas ŝin al parko por preni sunbanon.

Francio, la patrolando de mia edzino, estas tre bela lando. Ĉiujare ni ferias en Francio, pro tio ni aĉetis apartamenton en Parizo. Tamen, ni plejofte pasigas feriojn en Orléans kune kun miaj bogepatroj.

Iuj demandis, kiel ni solvis la problemon kaŭzitan de la kulturaj diferencoj inter ni. Mi volus respondi per demando: Kial tuŝi nur la diferencojn inter malsamaj etnoj kaj nacioj, sed ne la kulturan komunecon pli gravan? Ni ĉiuj amas pacon, soifas sciojn kaj aspiras feliĉan familion. Pro tio mia edzino kaj mi opinias, ke nia vivo fariĝas pli kaj pli dolĉa kun tempopaso. ■

Nacio alveninta laŭ la Silka Vojo

Teksto de **BING CHUAN**

Fotoj de **HAN HONG**

EN la urbo Lanzhou staras surstrate vico post vico da butikoj kaj inter ili la plej okulfrapaj estas islamaj restoracioj sub la ŝildo kun marko "Novluno kaj tri steloj". Sur la brua bazaro ofte aŭdiĝas krio de vendistoj de rostita ŝafaĵo. Inter la loĝdomoj staras alta moskeo kun verda kupolo. En la brua homamaso vidiĝas multaj hujoj en nigra veŝto kaj kun blanka ĉapo surkape. Lanzhou estas urbo ne nur industria, sed ankaŭ urbo de fruktoj.

PRAPATROJ DE HUJOJ

Iasence oni povas diri, ke la Lanzhou-aj hujoj havas apartan rilaton kun la antikva Silka Vojo, alivorte, ili alvenis al Ĉinio laŭ la Silka Vojo.

Laŭ la historia vidpunkto, hujnacio formiĝis en la 14-a jc., tamen la prapatroj de hujoj venis en Ĉinion en la 8-a jc. Tiam ili aktivadis ĉefe en la sudorienta marbordo de Ĉinio. Kantono, la fina urbo de la mara Silka Vojo, estis mondfama komerca haveno. Tie kolektiĝis komercaj ŝipoj el Arabio, Persio kaj aliaj landoj. Multaj alilandaj komercistoj fikslo-

ĝiĝis en Ĉinio por negoco. Ili havis siajn proprajn loĝkvartalojn, kie ili praktikis sian socian sistemon kombinantan politikon kun religioj laŭ la islama doktrino kaj observis la religiajn morojn de islamismo. Poste ankaŭ en Quanzhou (Ĉjüangöu) kaj Yangzhou aperis la similaj loĝkvartaloj.


Preskaŭ en la sama tempo islamanoj de la okcidentaj landoj transloĝiĝis orienten en Ĉinion laŭ la Silka Vojo kaj ĉe la vojo irita de ili aperis islamaj kvartaloj, inkluzive de Lanzhou. Tiuj


islamanoj alvenintaj laŭ la Silka Vojo estis prapatroj de hujoj en la nuna Ĉinio. Poste ili, multe influite de la ĉina kulturo, tamen konservis siajn proprajn naciajn morojn kaj religiajn kutimojn.

NACIO RELIGIEMA

La hujoj kredas je islamismo. Kontaktante ilin, mi ĉiam sentas ilian piecon al la religio. En la moskeo la forta religia etoso estas neforgesebla por mi. En Linxia (Linŝja)-a Huj-nacia Aŭtonoma Subprovinco, je 100 km for de

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO







Antaŭ la preĝejo



Moskeo en Lanzhou



Preĝado



Yang Sen, islama alranguo en Lanzhou



Lanzhou, staras granda moskeo, kiu elspiras ĉinan klasikan arkitekturon. Antaŭ la halo staras 3 arabismaj turoj kun verdaj kupoloj el armita betono, la meza estas 30 m alta kun botelforma ornamo kaj novluno ĉe la supro.

Akompanate de imamo, mi, laiko, estis permesita viziti la moskeon. Tie estas kvadrata korto, ĉe kies okcidenta parto staras preĝejo. La imamo diris al mi, ke dum la preĝado oni devas teni la okulojn al Kaaba de Mekko, pro tio en la okcidenta parto de la muro ne devas esti ajna konstruaĵo. En la suda parto de la korto estas tenejo kaj necesejo kaj la nordaj ĉambroj servas kiel loĝejo kaj gastoĉambro de la imamoj.

Laŭ la religia regulo estas malpermesate al virinoj eniri en la moskeon, tial en la moskeo ĉiuj en- kaj elirantoj estas viroj, inkluzive de 80-jaraj barbuloj kaj ankaŭ knabetoj. Antaŭ preĝado ĉiuj devas lavi siajn manojn, vizaĝon kaj piedojn ĉe la proksima baseno per akvo verŝita el la speciala botelo. Iuj banas sin en banejo.

Oni ne devas eniri la preĝejon kun ŝuoj, tial sur la koridoro vidiĝas multaj ŝuoj. Mi ne rajtis eniri, tial mi povis nur rigardi de ekstere. En la halo staris preskaŭ mil homoj ĉiu kun la vizaĝo al la okcidento. La halo estas dekoraciita modeste, ĉar islamismo malaprobas adori idolon, tial en la halo vidiĝas nur korano kaj geometriaj figuroj blankaj kaj verdaj sur muroj. La imamo konigis al mi, ke la ligna mansardo kaj bastono starantaj en la nordokcidento de la halo estas podio kaj talismano.

Je la 2-a ptm. maljunulo en robo suriris la podion kaj la halo tre brua tuj silentiĝis. La maljunulo komencis predikadon. Li parolis en dialekto, tial mi ne bone komprenis lin, tamen sur la vizaĝo de ĉiuj aŭskultantoj mi legis piecon. Post 10 minutoj la predikanto laŭte kriis kaj ĉiuj preĝantoj komencis adorkliniĝi: Ili murmurante surgenuiĝis, sin apogis per la manoj sur la planko kaj foje

refoje klinis sian kapon surteren. Mi turnis miajn okulojn kaj vidis, ke en la koridoro surgenuie staris multaj malfruiĝintoj.

La imamo diris al mi, ke en la malfasta tago la preĝado estas farata en la subĉiela placo, ĉar tiam la preĝantoj estas tre multaj kaj iam ilia nombro superis dekmil.


NACIO LERTA EN KOMER-CADO

Vizitante la moskeon, mi iris al huja vilaĝo por koni la vivon de la tieaj hujoj.

Estis mezgrada vilaĝo. La vilaĝestro nomiĝas Ma. De li mi infor-

Ĉiu bovo enspezigas ĉ. 2 000 juanojn ĉiujare. Ĉiu ŝafo kostas centojn da juanoj. La tieaj loĝantoj nun estas bonhavigantaj jaron post jaro.

En la vilaĝo la plej alta kaj bela konstruaĵo estas moskeo, kiu estas tre grava por la loĝantoj en ilia ĉiutaga vivo. Proksime de la moskeo estas elementa lernejo kun 16 ĉambroj kaj placo en la mezo. Kiam mi vizitis la lernejon, geknaboj voĉlegis tekston. La vilaĝestro kun fiero diris al mi, ke en lia vilaĝo ĉiuj lernoagaĝaj geknaboj vizitas lernejon. Antaŭ kelkaj jaroj iuj ne volis lasi siajn gefilojn lerni en la lernejo pro malriĉeco,



En tirado de vermiĉeloj

miĝis, ke en la vilaĝo estas pli ol 100 familioj, kiuj sin okupas ĉefe pri terkulturado kaj brutobredado. En la lastaj jaroj iuj viroj sin ekokupis ankaŭ pri komercado. La hujoj estas lertaj en komercado. Tio eble havas ian rilaton kun iliaj prapatroj, kiuj estis komercistoj. Ili komercas ankaŭ kun alilandanoj. Ili fondis organizojn, ĉiu el dekelkaj familioj, kaj faras kunlaboradon.

Ĉiu familio de la vilaĝo havas siajn proprajn terpecojn por kulturi grenon kaj legomojn. Tie oni ankaŭ bredas bovojn kaj ŝafojn.

la vilaĝa komitato do decidis pagi lernopagon por la malriĉaj geknaboj.

Mi deziris viziti hejmon de vilaĝanoj. Mi frapis je pordo de iu familio. Maljuna dommastro fervore akceptis min. Lia loĝejo konsistas el du kortoj. En la antaŭa korto estas tenejo kaj staloj kun du laktobovinoj, tri ŝafoj kaj grego da kokoj. En la malantaŭa korto estas florbedo kun diversaj belaj kaj aromaj floroj. La ĉefa domo el 7 ĉambroj rigardas suden. Tie loĝas la maljunulo kaj 5 membroj de la familio de lia filo. Sur




Huj-aj virinoj

Gastigado




En farado de tradicia manĝaĵo




Kampanoj kun siaj laktobovoj

En gravurado



Melkado



la muro de la ĉefa domo pendas du tapiŝoj aĉetitaj de li en Mekko. La maljunulo fieris pri tio. Vilaĝestro Ma diris al mi, ke por la ĉi-tieaj loĝantoj pilgrimi al Mekko estas malfacile. Pilgrimi al Mekko estas glorinde por la hujoj, tial ĉiuj pilgrimintoj al Mekko estas respektataj. Feliĉe, ke la maljunulo kaj lia filo ambaŭ pilgrimis al Mekko, pro tio lia familio estas tre enviata.

LANZHOU-AJ VERMIĈE- LOJ

Antaŭe mi sciis, ke la Lanzhou-aj tiritaj vermiĉeloj estas landfamaj kaj tre bongustaj. Ĉi-foje en Lanzhou mi bone konis la historion kaj preparadon de ili.

Oni ne scias ekzakte, kiam na-

skiĝis la bongustaj Lanzhou-aj tiritaj vermiĉeloj. Nun oni scias nur, ke antaŭ dekoj da jaroj huja kuiristo Ma Baozi funkciigis restoracion de vermiĉeloj kun poefagaĵo, kiuj estis tre ŝatataj de la klientoj.

Tuj kiam mi atingis Lanzhou, oni invitis min al restoracio de tradiciaj Lanzhou-aj tiritaj vermiĉeloj. En Pekino mi manĝis kelkfoje tiajn vermiĉelojn, tamen ĉi-foje en ilia hejmloko mi deziris scii ilian devenon kaj rigardi, kiamaniere oni faras ilin. Mi venis en kuirejon kaj vidis, ke kuiristo lerte faris la vermiĉelojn. Li prenis paston, tiris kaj tiradis ĝin. Post kelkaj minutoj la vermiĉeloj estas jam faritaj kaj enĵetitaj en la poton. La kuiristo estas posteulo de Ma Baozi. Li diris al mi, ke la plej

bonaj Lanzhou-aj tiritaj vermiĉeloj devas esti elastaj kun supo freŝa kaj bovaĵo longe kuirita kaj la supo farita el poefagaĵo kun osto. Por fari la vermiĉelojn la pastopreparado estas precipe grava. Lerta kuiristo povas fari la larĝajn, rondajn kaj tri-edrajn vermiĉelojn en egala dikeco. Mi informiĝis, ke kuiristo Ma povas fari dekkelk-specajn vermiĉelojn.

Kelnero surtabligis por mi grandan bovlon da vermiĉeloj tre okulplaĉaj. En la bovlo estis ruĝa kapsika oleo, verda koriandro, blanka rafano, flavaj vermiĉeloj kaj klara poefagaĵa supo preparita el plurspecaj kondimentoj.

En la sekvintaj tagoj ĉiutage mi prenis Lanzhou-ajn vermiĉelojn. Ili, tre plaĉaj al mi, faris sur mi neforgeseblan impreson. ■

'97-KONKURSO DE FOTOJ DE E-ISTOJ

Dank' al fervora subteno de niaj legantoj la rubriko "Fotoj Faritaj de E-istoj" pliriĉigis la enhavon de nia revuo. Ĉi tie ni kore dankas la kontribuintojn. Nemalmultaj legantoj interesiĝas pri la rubriko kaj esperas, ke ni ĝin daŭrigos, por ke e-istoj-fotoamatoroj faru interŝanĝojn. Pro tio ni okazigos en 1997 konkurson de fotoj faritaj de e-istoj kaj esperas, ke pli da e-istoj partoprenos en ĝi. Sendu al ni fotojn antaŭ la 31-a de aŭgusto 1997 (fotoj atingintaj post la dato partoprenos en la dua konkurso) kaj ili sinsekve aperos sub la rubriko "Fotoj Faritaj de E-istoj".

I. Prijuĝado kaj premiado:

Niaj redaktoroj kaj ĉinaj fotistoj invititaj de la redakcio prijuĝos ĉiujn fotojn aperintajn sub la menciita rubriko kaj donos al plej bonaj el ili la unua-, dua- kaj triagradajn premiojn.

II. Detaloj pri la konkurso:

Bonvenaj estas fotoj faritaj de e-istoj pri naturaj pejzaĝoj, vidindaĵoj, naciaj moroj kaj kutimoj. Bonvolu sendi al ni kolorajn fotojn

sur glacea papero kun grandeco almenaŭ de 126 x 86 mm aŭ kolorajn diapozitivojn, kaj koncizan klarigon por ĉiu foto. La nombro de la fotoj estas nelimitita. Skribu: por "Fotoj Faritaj de E-istoj", la nomon, adreson kaj landon de la aŭtoro preslitere.

III. Premioj:

Ni aperigos la nomon de la premiitoj en la decembra numero de 1997. La premiitoj ricevos de la redakcio la revuon de EPĈ n-roj 1-12 de 1998 kaj Esperantan libron: "Ĉina Enciklopedieto" por la unuagrada premio, "5 000 Jaroj de Ĉinio" por la duagrada kaj "Provu por Via Sano" por la triagrada.

La rubriko "Fotoj Faritaj de E-istoj" servas al ĉiuj e-istoj. Ni esperas, ke ĝi plaĉos al pli da legantoj. Laŭ la nombro de fotoj atingintaj la redakcion ni okazigos neregule tian konkurson, esperante, ke vi, niaj karaj legantoj, prezentos al ni proponojn kaj rimarkigojn por plibonigi la rubrikon.

La Red.

Verdaj manĝaĵoj en Ĉinio



Manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kun marko de verda manĝaĵo

OKTOBRE de 1995 okazis en Tianjin (Tjanĝin) ekspozicio de verdaj manĝaĵoj, kiu altiris al si proksimume 100 000 vizitantojn. En 4 tagoj vendiĝis 186 tunoj da varoj de pli ol 300 specoj. Ankaŭ iuj usonanoj kaj japanoj diris, ke estas tute ekster ilia atendo, ke en Ĉinio produktiĝas tiom da verdaj manĝaĵoj.

Ĉinoj nomas verdaj manĝaĵoj la nepoluitajn, bonkvalitajn kaj nutroriĉajn manĝaĵojn.

La verdaj manĝaĵoj renomiĝis nur en la lastaj jaroj. Kun senĉesa altiĝo de la popola viv-

nivelo, la koncepto de ĉinoj pri manĝaĵoj iom post iom ŝanĝiĝas. Antaŭe la ĉina popolo zorgis nur pri sia satiĝo, sed nun donas atenton ankaŭ al dietistiko. Antaŭ kelkaj jaroj loĝantoj de nordokcidenta Pekino ne ŝatis legomojn kreskintajn tie, ĉar en la loko troviĝas multaj fabrikoj kaj la tieaj legomoj estas poluitaj. Ili preferis legomojn malpli serioze poluitajn en la sudorienta parto de la urbo. Nun en multaj vendejoj de ĉinaj urboj funkcias vendotabloj de verdaj manĝaĵoj. Nekompleta statistiko montras, ke 84% de la konsumantoj en Pekino kaj

Ŝanhajo preferas verdajn manĝaĵojn, kaj vidiĝas sur la manĝotablo de popolanoj pli kaj pli da verdaj manĝaĵoj, kiaj rizaĵo, farunaĵo, frukto, legomo, viando, ovo, fiŝo, spicaĵo kaj trinkaĵo.

La aktiva aĉetado ekscitis la produkton kaj ekspluaton de verdaj manĝaĵoj. En 1989 kaj 1990 pro merkata depresio ne forvendiĝis triono da rizo de QinA'an-gubernio, Heilongjiang (Hejlongĝjang)-provinco. Kaj ĝuste tiam iu kamparano de la gubernio sterkis la kampon per naturaj sterkoj anstataŭ la kemiaj kaj sarkis ne per kemiaĵoj sed per sarkiloj.

Pro tio la de li rikoltita rizo estis pura kaj blanka kiel jado, kaj ĝia kuirado estis aroma. Tial, lia rizo rapide elvendiĝis. Edifita de tio la loka registaro decidis produkti verdajn manĝaĵojn. Post ekzameno kaj takso far koncernaj departementoj, en 1993 la gubernio kulturis 10 000 hektarojn da bonkvalita kaj nepoluita rizo, kies triono estis por verdaj manĝaĵoj. En 1994 la tiea rizo ne povis kontentigi la bezonon kaj sole ekspluato de la verda manĝaĵo rizo donis 30 milionojn da juanoj al la loko.

Post sia fondiĝo en 1992 la Ĉina Disvolva Centro de Verdaj Manĝaĵoj sub la Agrikultura Ministerio starigis 34 komisiitajn instituciojn en 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio kun la celo laŭplane disvolvi verdajn manĝaĵojn. Nun en Ĉinio 600 specoj da manĝaĵoj rajtas uzi la markon emisiitan de tiu establo.

La marka bildo kun la suno supre, verdaj folioj kaj burĝonoj malsupre simbolas la viglan vivon sub la brilaj sunlumoj, kongigas, ke la sekuraj kaj nepoluitaj verdaj manĝaĵoj el puraj kaj

bonaj ekologiaj medioj portas vivforton kaj avertas, ke oni devas protekti la harmonion de la medio kaj naturo. Ja estas nefacile akiri markon de la verdaj manĝaĵoj, kiun rajtas uzi nur la produktaĵoj konformaj al la normoj de verdaj manĝaĵoj pri ekologiaj medioj, produktaj reguloj, kvalito kaj higieno, ellaboritaj de la Agrikultura Ministerio. S-ro Zhang Zongcheng, supera inĝeniero de la kontrolejo de la Ĉina Disvolva Centro de Verdaj Manĝaĵoj, diris al mi, ke la ekzameno pri verdaj manĝaĵoj estas multe pli rigora ol tiu pri la ordinaraĵoj. Ekz. greno, unu el la specoj de la verdaj manĝaĵoj — devas trapasi 21 normojn en la ekzameno sole pri resto de insekticido, malutilaj pezaj metaloj kaj bakterioj, dum la ordinaraĵoj — nur 10. Verda manĝaĵo laktopulvoro devas trapasi 15 normojn en la ekzameno, dum la ordinaraĵoj — nur 9. Sankcio de la produkto de la verdaj manĝaĵoj validas nur 3 jarojn kaj poste oni devas peti sankcion denove. Dum la 3 jaroj oni faras specimenan ekzamenon al varoj ĉiujare por unu aŭ du fojoj. Krome, la pakumo de verdaj manĝaĵoj

devas esti normigita kaj ilia marko estas leĝe protektata.

Dank' al sia alta kvalito verdaj manĝaĵoj facile trovis sian merkaton internacie. Antaŭ kelkaj jaroj iuj manĝaĵoj ne akiris rajton eksportigi, ĉar la insekticido entenata en ili superis la normon. En la pasintaj jaroj pluraj specoj akiris emblemon de verdaj manĝaĵoj kaj havis grandan debiton en la internacia merkato. Iuj el ili havigis al si rajton esti ekster kvaranteno de la importantaj landoj. Pluraj specoj da verdaj manĝaĵoj kredindaj kaj renomaj pogrande vendiĝas en la internacia merkato. En 1993 la Ĉina Disvolva Centro de Verdaj Manĝaĵoj oficiale aliĝis al la Internacia Federacio de Organika Agrikultura Movado (IFOAM), kio markis, ke Ĉinio faris gravan paŝon al la monda merkato. Prezidanto de IFOAM diris, ke la praktiko de la ĉinaj verdaj manĝaĵoj estas avangarda en la mondo kampe de la samspecaj manĝaĵoj.


Estas fakto, ke Ĉinio komencis disvolvi siajn verdajn manĝaĵojn kompare malfrue kaj devas fari multon por ilin perfektigi. En la lastaj jaroj ili estis ŝatataj de la publiko, tamen ankoraŭ ne estis landskala merkato. Nuntempe ilin aĉetas ĉefe urbanoj bone salajrataj. En 1994 Tianjin-a rizkampo estis minacata de fiinsektoj, ĉar la tiea rizo estis por verdaj manĝaĵoj kaj uzo de insekticido — malpermesata, la kamparanoj devis persone kapti fiinsektojn. La similaj ekzemploj ne mankas, kio certe pliigis la produktan koston. Krome, la establoj de verdaj manĝaĵoj plejparte situas en malproksimaj montregionoj, kies malfacila trafiko multe malhelpas transporti verdajn manĝaĵojn. Pro tio la starigo de vendo-retoj de la verdaj manĝaĵoj estas urĝe bezonata. ■



Ekspozicio de verdaj manĝaĵoj en Tianjin

Diversaj naciaj festoj en Ĉinio

de WEI GUOXIONG



Nadam sur la stepo

EN Ĉinio multas ne nur la nacimalplimultoj, sed ankaŭ iliaj festoj. Pri tio ne estas troiga la esprimo: “La nacimalplimultoj festas post tri aŭ kvin tagoj.” Iam okazas, ke malsamaj nacioj festas la saman tagon pro malsamaj kaŭzoj.

Ekzemple, la oka tago de la kvara monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas festo por pluraj nacimalplimultoj. Tiutage, en meza kaj sudokcidenta Ĉinio mjaŭ-aj junuloj ludas luŝeng-on kaj junulinoj vigle dancas memore al sia nacia heroo; kaj ĝuang-oj en suda parto de Guangxi (Gŭangŝji) okazigas ceremonion memore al la sia. La celebrado de buji-oj en la sama tago rilatas al kamplaboro — ili manĝigas al la bovoj kvinkoloran gluecan rizaĵon kaj ripozigas ilin por unu tago. En malsamaj lokoj la tuĝja-oj festas tiun tagon kun diversaj enhavoj: iuj festas datrevenon de la naskiĝo de la Budho; aliaj — naskiĝtagon de bovo; ceteraj festas por pliigi sian energion, t.e. manĝi nove kreskantajn bambuŝosojn.

La unua tago de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro, nome la Printempa Festo, estas unu el la plej gravaj tradiciaj festoj de la ĉina popolo. En la festotago

oni okazigas solenadon por adiaŭi la malnovan jaron kaj peti riĉan rikolton en la venonta jaro. Drak-danco kaj leon-danco estas ofte ludataj tiutage.

Ne nur han-oj, sed ankaŭ ĝuang-oj, manĉuroj, kore-nacianoj, mongoloj kaj aliaj nacimalplimultoj solenas la Printempan Feston, ĉiu kun siaj propraj naciaj trajtoj. Ekz., la ĝuang-oj kutimas manĝi gluecan rizaĵon volvitajn per bambuaj folioj en la festo. Tia rizaĵo ĝenerale estas tre granda, iu pezas eĉ 5-6 kilogramojn. Frumatene de tiu tago lahu-aj gejunuloj konkure iras al fonto por ĉerpi akvon, kiu estas rigardata kiel simbolo de pureco kaj feliĉo.

Pro geografia kaj klimata diferenco nacimalplimultoj festas sian novjaron en malsamaj tagoj kaj per malsamaj manieroj. Ekz., la ji-oj de Sichuan-provinco festas

Novjaron en oktobro. La taj-oj de Yunnan-provinco en aprilo festas sian Novjaron — La Akvoversan Feston. La tibetanoj festas la Novjaron laŭ sia propra kalendaro.

En Ĉinio la nacimalplimultoj plejparte havas religian kredon. El religioj originis multaj festoj.

Por la huj-oj, ujguroj, kazaĥoj kaj aliaj nacimalplimultoj, kiuj kredas je islamo, la Fasto-rompa Festo, Mahomet-nasko kaj korban-festo estas la plej gravaj. La tibeta preĝ-kunsido estas tradicia festo de tibeta budhismo.

La de taj-oj atentataj Pordoferma kaj Pordomalferma Festoj estas budhismaj. De la Pordoferma Festo ĝis la Pordomalferma Festo, en ĉiuj unua, sepa, dekkvina kaj dudektria tagoj, la pli-ol-40-jaraj budhistoj enloĝigas en la templon por du noktoj kaj tri tagoj. En la templo ili aŭskultas reciton de su-



troj, vivas kiel bonzoj. Iliaj manĝaĵoj estas portataj de iliaj gefiloj.

Iuj festoj originis de laboro. Printempe, en sudoriento de Guizhou(Gujǒu)-provinco, la dong-oj celebras la Vojo-vivigan Feston, kiu signifas komencon de printempa terkultivado. La vilaĝanoj kolektiĝas sur kampo, iu respektato faras modelon plugi kampion, planti pajlojn por signifi rizid-prikladon. Post la ceremonio oni kantas kaj dancas. La baj-oj en Yunnan-provinco lertas kulturirizon. Ĉiujare en la tempo de rizid-priklado ili okazigas koncernen aktivadon.

La evenkoj sur stepo de norda Ĉinio celebras la Rikoltan Feston en la 22-a de la kvina monato laŭ la ĉina luna kalendaro. Tiutage en festaj vestoj oni vizitas unu alian.

Malgraŭ diferencaj naciaj trajtoj en la nacimalplimultaj festoj oni prenas amuzon kiel ĉefan enhavon.

La tria monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas flora sezono ĉe la Nujiang(Nuǒjiang)-rivero en Yunnan. Tiam ĉiuj nu-oj en florumitaj vestoj, kun floroj en la manoj drinkas rizvinon kaj reciprokas kantojn por celebri la Floran Feston.

Wenquan(Ŭenĉĵān)-subdistrikto de Dushan-gubernio, Guizhou-provinco, famas pro siaj termofontoj. La sesa tago de la sesa monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas tradicia Festo por Bano de la lokanoj — ŝuj-oj. En la festotago sennombraj homoj sin banas en fonto kaj faras reciprokadon de kantoj tagnokte.

Nuntempe la antikvaj festoj portas ankaŭ novepokajn trajtojn: en la festotagoj oni ne nur sin amuzas, sed ankaŭ faras komercadon.

Nadam estas pompa kunveno de mongoloj. Ĉiujare, en somera fino kaj aŭtuna komenco, la mongoloj feste vestitaj kolektiĝas sur stepo por celebri sian feston. En la kunveno okazas ne nur la tradiciaj sportaj konkursoj, kiaj luktaĉado, ĉevalkonkuro, sagpafado, ŝnurtira lukto kaj pilkoludo, sed ankaŭ artaj prezentoj, diversaj ekspozici-



Ĝuang-aj junulinoj en reciprokado de kantoj en la Festo de "La Tria de la Tria Monato"




Mongoloj en festo

cioj kaj komercaj traktadoj.

Menciindaj estas ankaŭ la Torĉa Festo de ji-oj, la Festo "la Tria de la Tria Monato" de ĝuang-oj, la

Ĉabaj-a Kantfesto de la buji-oj, la Festo de "Triamonata Strato" de baj-oj ktp. ■



Dieto laŭ korpopezo

de JIANG XIYUAN



Komputera laborejo de daten-banko de la kompanio Wanfang

NUN oni rigardas trafikoplenan komunikan reton kiel ekspresan vojon kaj daten-bankon kiel "trajnon" kuran sur la vojo. En Ĉinio la voj-konstruado kaj trajn-fabrikado disvolviĝas rapide kaj multaj faras siajn kontribuojn por tio. S-ro Zhu Wei kaj liaj kolegoj faris daten-bankon, la plej grandan en Ĉinio, opiniante, ke en la estonteco taŭgaj "trajnoj" ne povos manki sur la informa ekspresa vojo de Ĉinio.

Kiam la informa ekspresa vojo rapide disvolviĝas en la evoluantaj landoj kaj sin etendis en Ĉinion, ĉinoj rimarkis, ke ĉe ili mankas taŭgaj "trajnoj". Ĝuste pro tio en 1988 s-ro Zhu Wei kaj liaj kolegoj planis meti la informojn pri la ĉinaj entreprenoj sur la ekspresan vojon. Ili decidis konstrui daten-bankon, sin turnante al la merkato. Asociante sin kun centoj da informaj institucioj, ili kolektis la koncernajn datenojn de la entreprenoj, faris servadon kaj vendon samtempe kun konstruado de la daten-banko. Rezulte de tio la Daten-banko de Ĉinaj Entreprenejoj kaj Kompanioj estis honorita kiel bona amiko de entreprenistoj kaj fondiĝis Daten-kompanio Wanfang, la unua speciala ĉina kompanio de daten-banko.

Post tio incitate de la merkato ili ekspluatis daten-bankon de ĉinaj scienc-teknikaj fruktoj, kiu ampleksas 130 000 teknikajn atingojn, tiun de ĉinaj scienc-teknikaj dokumentoj kun 1.2 milionoj da notoj, tiun de ĉina komerca komunikado kun adresoj kaj nomoj de du milionoj da entreprenoj kaj tiujn de ĉinaj scienc-esploraj institutoj, de ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj kaj de disertaĵoj de ĉinaj akademias konferencoj.

Farinte taŭgajn "trajnoj", la kompanio ekservis al la klientoj per lumaj diskoj, softaj diskoj kaj aliaj transportantoj, mikrokomputeraj, retaj kaj aliaj tabuloj kaj liveras al la serĉ-sistemo de la reto

SHU MEI:

Por la informa ekspresa vojo de Ĉinio

siajn daten-bankojn. En 1995 la kompanio fondis serĉ-stacion de lumaj diskoj en 30 informaj establoj kaj bibliotekoj de Ĉinio. Tiuj stacioj kun milionoj da scienc-teknikaj notoj faris efikan servadon al la ekonomia kaj scienc-teknika disvolviĝo de la koncernaj lokoj. Direktoro de konstru-disvolva kompanio de la provinco Fujian (Fugĵan) diris al mi, ke en la lasta duonjaro de 1993 lia kompanio urĝe bezonis cementon, tamen la provinco kaj proksimaj lokoj tiam estis en energia dom-konstruado kaj la cementa prezo estis terure alta, li do konsultis la serĉ-stacion de la lumaj diskoj kaj akiris cementon el iu norda fabriko, kaj sole en tio la kompanio ŝparis pli ol 400 000 juanojn (ĉ. 8.3 juanoj egalas al unu usona dolaro).

Nun la kompanio Wanfang ekdirektis siajn "trajnoj" sur la internacian informan ekspresan vojon. Por atingi la normojn de la internaciaj daten-bankoj, la kompanio alprenis informojn el diversaj kanaloj kaj ofte reformis la daten-bankojn. De 1994 ĝi reformis siajn daten-bankojn du fojojn ĉiujare, antaŭe ĉiujare nur unu fojon. Tio garantiis la ĉioampleksecon kaj aŭtoritatecon de la daten-bankoj. Nun pli ol 1 000 klientoj en 40 landoj kaj regionoj uzas la lumajn kaj softajn diskojn de la kompanio Wanfang. En 1995 la usona kompanio Knight-Ridder decidis enretigi la daten-bankojn de la kompanio Wanfang en la du serĉ-sistemojn interligitajn kun la tuta mondo kaj per tio finiĝis la historio, en kiu mankis informoj de la ĉinaj entreprenoj en la aŭtoritataj internaciaj serĉ-sistemoj.

S-ro Zhu Wei nun funkcias kiel ĝenerala direktoro de la kompanio. Li diris, ke nuntempe la ĉinaj daten-bankoj ankoraŭ estas malalt-nivelaj, tamen li kredas, ke sur la morgaŭa informa ekspresa vojo certe kuros la plej progresaj "trajnoj" faritaj de ĉinoj mem.

Kvadrata korto kaj kuirforno

ESTAS ĉagrene, ke fajro estingiĝas en kuirforno. Kiel abundajn kaj bongustajn manĝaĵojn oni deziras, kiel bonan apetiton oni havas, se nur estingiĝas la fajro, ĉio forvapiĝas. Tion sekvas nur hasta klopodado.

Neforgesebla estas por mi jena travivaĵo en la infaneco. Foje, en nia hejmo estingiĝis fajro en la forno. Mi, miaj frato kaj fratino decidis fari fajron, por ke la panjo havu vespermanĝon tuj post sia hejmeveno. Mia juna fratino eltiris kradaron el la forno kaj forigis la skorion. Mia frato bruligis lignon. Mi enŝutis karbobulojn en la fajrujon... Kun espero ni atendis leviĝon de la flamo. Kiam ni malfermis la kovrilon de la forno, leviĝis densa fumo. Efektive ni forgesis remeti la kradaron, tiel la karbobuloj estingis la flamon. "Jen via kulpo," la frato verŝis koleron sur min. "Via kulpo!" mi ne cedis. La timema fratineto opiniis, ke ŝi kaŭzis la eraron, ĉar ŝi fortiris la kradaron kaj ne remetis ĝin. Mia patri-no revenis. Antaŭ la malordo de la domo kaj nia kverelo ŝi ekridis: "Ho, granda bru! Lupo transportas lignon, hundo bruligas fajron."

"Kion vi diris?"

"Mi diris, ke lupo transportas lignon, hundo bru-
Karbo-portisto servas en kvartalo sen gasodukto.



ligas fajron, leporo senŝeligas rizon, papago prizorgas ventumadon..."

"Kaj plie?"

"Kato tranĉas legomojn, rato portas trinkakvon. Ili rompas la bovlojn. Ĝojas oni pro tio."

"Interese! Ankaŭ bestetoj scipovas labori."

Panjo aldonis: "Kaj plie ili povas labori harmonie, ne kverelis nek plendis unu kontraŭ la alia kiam la afero fuŝiĝis."

Ni tri ekridis, aŭdinte novan rakonton ĉe la kuirforno. Ni, malsataj, sidis apude kaj rigardis, kiel la panjo preparis vespermanĝon.

Tian vivon ni pasigis en kvadrata korto, kiu konsistas el unuetaĝaj domoj en la kvar flankoj. Tio estas tipa loĝdomo de la urbanoj de Pekino. Antaŭe en ĉiu korto loĝis nur unu familio. Poste pro loĝantara kresko en ĉiun korton enloĝiĝis kelkaj aŭ eĉ dekelkaj familioj. Tial oni nomas ĝin ankaŭ "miksloĝata korto".

La homoj en "miksloĝataj kortoj" vivis simplan vivon. Babilante virinoj balae kolektis la karban pulvoron kaj faris el ĝi karboplaton. Ili, ankaŭ kaŭrante ĉe la forno, serĉis neforbrulintajn karbobulojn el la skorio. Tia laboro iam estis farita ankaŭ de infanoj. Oni povas diri, ke ĝuste ĉe la forno naskiĝis la koncepto pri laboremo kaj ŝparemo de infanoj.

En la 60-aj jaroj la pekinanoj ekuzis ĉelarokarbon. Sur la tinet-forma karbopeco kun diametro de 12 cm, regule situis multaj truetoj. Ĉar la truetoj similas al ĉelaroj, oni donis al la karbopeco la nomon "ĉelarokarbo". Antaŭ ol hejti fornon, oni ordinaro metis sub la karbo facile ekbruligan karbopecon, kio multe faciligis la hejtadon.

Tamen en Pekino oni estis daŭre ĝenitaj de karbo. Antaŭ vintriĝo ili devis prepari sufiĉe da brasikoj kaj karbo por sia vintra vivo.

Transportado de karbo estis laciga kaj malpuriga, kion prizorgis specialaj laboristoj de karbovendejo. Oni transportis la menditan karbon tuj ĉe onia alvoko. Kaj sub la arda suno kaj en frosta vento la karboportantoj triciklis sur stratoj en la urbo. Enironte la korton, ili alvokis la mendintojn per simpla vorto "Karbo venis!" Ili tre malmulte parolis kun loĝantoj en la korto. El ilia parolo oni povis konstati ke ili venis el kamparo. La mendintoj elkore dankis ilin.

La ĉelarokarboj okupis spacon en la korto. Oni

En dormoĉambro de studentinoj

LA nomita dormoĉambro kun kvar duetaĝaj litoj estas bonorde aranĝita: Sub la litoj kuŝas librokestoj kaj vesto-kofroj; sur la dorsflanko de la pordo pendas lavtukoj; longa tablo servas kiel skribotablo kaj manĝotablo; sur la fenestra breto metiĝas tasoj kaj glaso kun dentobroso kaj dentopasto ene; sur litkadroj najle fiksiĝas medikamentaj skatoloj kaj paperaj saketoj destinitaj por skribiloj... En tiu malgranda dormoĉambro ĉiu studentino posedas sian propran spaceton, t.e., liton.

Tio ĉi estas dormoĉambro de studentinoj de la Pekina Nacia Universitato.

“Ĝus veninte ĉi tien, ni tre sopiris

al la hejmloko,” diris la studentinoj de la fakultato de ekonomika administrado, kiuj loĝis en la dormoĉambro n-ro 505. En la unuaj tagoj post studentigo ili vizitis siajn samlokanojn en la famaj Pekina Universitato kaj Qinghua (Ĉinghŭa)-universitato, kies instruaj domegoj kaj bibliotekoj imponis per siaj majesteco kaj eleganteco. Reveninte en la dormoĉambro, ili diskutis, ĉu ili devas ripeti la lernadon en la hejmloko por sukcese ekzameniĝi al fama universitato.

“Se tiel, kion do ni diru al la gepatroj kaj samlokanoj, hejmenreveninte?” diris Luo Qin (Lŭo Ĉin). “Mi jam akceptis donacitan monon, kiun miaj parencoj ŝparis el la ĉiutaga vivo. Kaj plie, kion fari,

se ni malsukcesus en la ekzamenoj? Ne, ni ne revenu hejmen. La renomo de la lernejo ne decidigas, ĉu ni fariĝos talentuloj.” Tiel, la studentinoj de la dormoĉambro rapide liberigis sin el la malkontentiĝo. Nun, ili ne nur finis la studadon en la universitato, sed ankaŭ sukcesis en la ekzamenoj de 12 koncernaj fakoj kaj akiris la ateston pri kontisteco.

Aro da koloraj balonetoj flirtantaj ĉe la lito altiris mian atenton. “Ili estas destinitaj por la vespera renkontiĝo antaŭ la diplomiĝo,” klarigis Meiqin (Mejĉin). Menciante disiĝon post diplomiĝo, tiu altastatura studentino iom ĉagreniĝis: “Dank’ al la sorto, ni vivas kune. Kaj nun ni ne volas disiĝi unu de alia.”

stakigis ilin ĉe murpiedo, sub fenestrobreto aŭ en porĉo. La nigraj karbopecoj stakigitaj kaj brasikoj sunumataj kontraste fariĝis apartaj vidindaĵoj en la kortoj. Samkiel la rikoltitaj flavaj maizospikoj kaj ruĝaj kapsikoj, kiuj pendas sub aleroj de vilaĝdomoj, ili prezentis fortajn lokajn trajtojn.

Por hejtado oni devis loki la fornon en la ĉambro kaj starigi fumtubon inter la forno kaj fenestroj, ĉar timiga estas haladziĝo. Tiam la kvartala komitato dediĉis apartan atenton al la sekureco. Ĝi kontrolis, ĉu la forno estas tro proksima al lignaj mebloj, ĉu la interspaco inter la fumtuboj estas bone muntitaj, ĉu oni scias malfermi la klapon de fajrujo al la fumtuboj antaŭ onia endormiĝo...

En neĝaj vintraj tagoj infanoj faris neĝan homon kaj ludis neĝobatalon. Neevitebla estis bagatela konflikto, tamen tio ne malhelpis ilian reamikiĝon. Post sufiĉa distriĝo, ili kolektiĝis en hejmo de iu ajn el ili, manĝis bonodorajn bakitajn batatojn kaj sekigis ĉe fajro la vatŝuojn. Dume iliaj patrinoj ekstere balais la neĝon sur la strato por ke pasantoj ne falu.

Ĉinoj ofte diras, ke najbaro proksima taŭgas pli, ol frato fora. En la funkciigado de la karboforno montriĝis la najbareco. Antaŭ estingiĝo de la fajro, la najbaro aldonis al ĝi karbopecojn. Geedzoj ambaŭ forestis hejme, najbara maljunulino do memvole zorgis pri ilia forno kaj preparis tagmanĝon por la de lernejo reveninta infano. En somero, pro troa varmo, kelkaj familioj kune uzis fornon. Tiel la rilatoj inter najbaroj fariĝis pli kaj pli intimaj.

Pro kresko de la loĝantaro en Pekino, ne sufiĉis la loĝejoj. Oni do malkonstruis kortojn kaj konstruis etaĝdomojn, dume kuirgaso anstataŭis la ĉelarakarbon. Tio estas socia progreso en la loko. Tamen loĝante en etaĝdomoj, oni rimarkis, ke mankas al la oportuna moderna vivo la antaŭa intimeco kiel en la kortoj. Ho, bedaŭrinde! Do ili denove eliris el la etaĝdomo, amase sin ekzercas per kolektiva danco. Iu maljunulo, loĝinta en kvadrata korto pli ol 60 jarojn, neniel eltolerinte sian solecon, diris al sia filo: “Demandu pri la adreso de niaj antaŭaj najbaroj. Mi volas viziti ilin.” ■

Vere, inter tiuj ok studentinoj regis amikeco kaj unuanimeco. Se iu el ili pli frue ellitiĝis, la aliaj ne plu kuŝis en lito. “Ŝi sola legas en fremda lingvo, kaj ni sentas psikan malekvilibron tiukaze.” Tamen, se iu el ili forgesis manĝi pro absorbiĝo en legado, la aliaj certe alportis al ŝi manĝaĵon. Ili aĉetis grandan spegulon kaj pendigis ĝin sur muro. “Ofte sin rigardi en ĝi ebligas firmigi sian memfidon,” diris la bela studentino Eta Hirundo.

Ĉiuj studentinoj havis fortan emon legi bonajn literaturaĵojn. Ĉe ĉiu lito kuŝis ŝatataj legaĵoj, kiaj “Juneco”, “Amikino” kaj “Intimulo”.

Post kiam ili sukcesis en ekzamenoj, ili havis bankedon. Ĉiuj preparis po pladon kun sia hejmloka gusto, krom Shengli, kiu ne lertis en tio kaj devis lavi la manĝilarojn. Ili venis el diversaj lokoj de Ĉinio kaj havis tute malsamajn gustojn. Eta Hirundo ne ŝatis akran guston. Ŝi diris: “Shengli ofte manĝas kapsikojn unu post alia, kia teruraĵo!” La lasta senprokraste refutis: “Kaj vi, eĉ en sonĝo, manĝis rostitajn arakidsemojn el mia hejmloko.”

Ilia ofta paroltemo estas, ĉu studentoj devas havi amaferon.

Studentino A: “Oni bedaŭros dum la tuta vivo, se oni ne havas amaferon en la universitata vivo.”

Studentino B: “Amafero disigos vin de aro da amikoj.”

Studentino A: “Unu intimulo sufiĉas por la tuta vivo.”

Studentino B: “Tia amo ne daŭros longe post diplomiĝo kaj pro laboro en malsamaj lokoj.”

Studentino A: “Sed plej gravas la nuna amo.”

Studentino B: “Perdo de amsen-to!”

Tiam iu uzis diktafonon kiel kameraon kaj pošlampon kiel mikrofonon kaj “intervjuis” kiel raportistino de televida stacio. La intervjuato prenis la mikrofonon, emocie respondis kaj kantis amkanton. Ĉe tio iu studento frapis je la pordo. “Diru ekster la pordo, se vi havas ion por nin informi,” voĉo de la studentinoj, kiuj sin detenis de

rido.

Antaŭ tiuj knabinoj viglaj kaj naivaj mi ekpensis pri studentinoj, kiuj lernis por du licencioj en alia universitato. “Ni kunvivis harmonie dum kelkaj jaroj, sed ni neniam verŝis la koron unu al alia. Ordinare, ĉiu el ni sin okupis pri sia



Studentinoj en la ĉambro n-ro 505

propra afero. Kaj poste ni faris praktikon en unu sama fako kaj tutforte konkuris por havigi al ni la eblon labori en Pekino post diplomiĝo,” diris iu studentino. “Ni estas tre lacaj kaj havas nenion alian ol faksciojn. Ankaŭ ni volas amaferon, sed tre malfacile troveblas niaj korinklinuloj...”

Kompare kun ili, eble la studentinoj en la ĉambro n-ro 505 vivas facile. “Ĉu ankaŭ vi havas ĉagrenon?” “Jes, sed bagatela.” Hazarde mi rimarkis paperon kun la teksto sur muro de la dormoĉambro: “Ofte amikeco kaj amo kontraŭstaras”. “Jen nia komuna kono,” Jiu Ping (Ĝiŭ Ping), kiu skribis la vortojn, eksplikis: “La amikeco inter gestudentoj facile disvolviĝas en amon aŭ estas miskomprenata kiel amo. Ni aspiras belan amikecon, sed tre maloftan. Tio nin afliktas iam.” Sur la papero legiĝis ankaŭ maksimumo “Ĉe ĉagreno kantu amkantojn!” “Kaj vi, Shengli?” mi

demandis. “Mi verkas poemon ĉe ĉagreno,” ŝi respondis.

“Ĉu vi volas labori en Pekino?”

“Kompreneble jes, sed en Pekino oni malfacile trovas por si idealan postenon. Ni ne volas perdi bonŝancon en niaj hejmlokoj. Tie ni energie laboros kaj eblos al ni fariĝi

entreprenistinoj kelkajn jarojn poste.”

Ili jam aĉetis biletojn por trajne reveni al siaj hejmlokoj. “Bonvolu legi niajn adiaŭajn vortojn.” Mi prenis kajerojn kaj lante foliumis ilin:

“Amikoj sinceraj, amikeco altvalora.”


“Tempo plej bela forpasas plej rapide.”

“Sopiro kiel poemo recitata jare.”

“Post la adiaŭo ni malfacile renkontiĝos denove,” malĝoje diris Luo Qin. “Antaŭe, antaŭvespere de la komenco de someraj aŭ vintraj ferioj, ni diskutadis, kuŝante en lito, pri reciprokaj donacoj por denova renkontiĝo, sed ĉi-foje...” Mi bone sciis, kiom ili deziras diri: “Tun tagon ni denove renkontiĝos en Pekino kun niaj propraj laborfruktoj kaj donacoj.” ■

EKONOMIO

- Lastatempe estis lanĉita la 150 000-tonela cisternoŝipo n-ro 1, kun longo de 270 m kaj larĝo de 44 m, farita de la Nova Ŝipkonstruejo de Dalian, Ĉinio, por Norvegio.



La cisternoŝipo en lanĉado

- Riparejo de grandaj aviadiloj finkonstruiĝis antaŭ nelonge en la Ĉefurba Internacia Aerodromo de Pekino, kio metis finon al la historio, en kiu grandaj aviadiloj de Ĉinio estis riparataj eksterlande.

- La ubro Xishan (Ŝjiŝan), Jiangsu (Ĝjangsu)-provinco, unu el la lokoj de Ĉinio, kie plej frue disvolviĝis vilaĝaj entreprenoj, enspezis 51 miliardojn da juanoj el varvendado en 1995.

Nun la urbo komencis alian entreprenadon, inkl. de starigo de grandaj kompanioj-grupoj, disvolvado de sciencoj kaj teknikoj, merkata cirkulado, entreprena administrado k.a.

- Antaŭ nelonge en la Internacia Foiro de Horloĝoj kaj Juveloj en Baselo de Svisio, kiu okazas ĉiujare, la brakhorloĝo kun marko Rosiny, fabrikita de la Speciala Distrikto Zhuhai de Ĉinio, altiris al si multajn entreprenistojn. Mendokosto por ĝi estis 380 usonaj dolaroj, kaj tiu de alispeca ĉina brakhorloĝo neniam antaŭe superis cent usonajn dolarojn en la internacia merkato.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

- La unua rapidneŭtrona reaktoro de Ĉinio naskiĝos post nelonge.

En la mondo estas du specoj da nukleaj reaktoroj, t.e., termoneŭtrona kaj rapidneŭtrona reaktoroj. La generatora kapacito de termoneŭtrona reaktoro bezonas multan uranion, dum rapidneŭtrona reaktoro, plene utiligante ^{235}U , transformas malfacile fisiigeblan ^{238}U , kiu konsistigas 99.3% de U-riĉfonto, en fisiigeblan ^{239}Pu . Rezulte de tio,

la utiligebleco de U-riĉfonto 60-70-obliĝis. Tial, uzado de rapidneŭtrona reaktoroj havos gravan signifon en la ekonomia disvolvigo de Ĉinio.

- Ĉinio trovis sintezan defensivan vojon kun tertrema prognozo kiel la bazo en tertrema observo, prevento de tertrema katastrofo, posttertrema rekonstruado k.a. De la fino de la 80-aj jaroj, kiam Ĉinio eniris en novan tertrem-aktivan periodon, oni jam faris dek prognozojn pri mezgrada kaj pli-olmezgrada tertremoj, inkl. de tiu de Gonghegubernio, Qinghai-provinco. Precipe la sukceso en la mezperiodaj kaj mallongperiodaj prognozoj pri la 7.3-grada tertremo, okazinta ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Birmo la 12-an de julio 1995, ne nur multe reduktis ekonomian perdon kaj la nombron de vunditoj kaj mortigitoj, sed ankaŭ kuraĝigis la sismologajn rondojn en kaj eksterlandajn. Nun en Ĉinio estas pli ol 700 tertrem-observaj stacioj kaj 27 tertrem-telemetriaj retoj. Kaj iuj altaj teknikoj, kia satelita telesensa tekniko, servas al tertremaj observo kaj prognozo.

- Esploro pri utiligo de avantaĝoj de sekkampaj tritikaj hibridoj, rigardata kiel monde malfacila problemo dum longa tempo, sukcesis en Ĉinio. Supera agronomo Wang Changchun de agrikulturteknika centro de Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco elkulturis novan serion el kvar T-formaj specioj de hibridita tritiko. La eksperimentado en la regiono norde de Weihe-rivero montris, ke ĉiu hektaro pliproduktis tritikon meznombro je 750-1 050 kg en sinsekvaj tri jaroj, kompare kun nehibridita specio.

- Sukcesis antaŭ nelonge la telekomunika identigo de "Ĉinio n-ro 1", la 22-a viv-satelita terstacio en la mondo, kun la Tergloba Viv-satelita Telekomuniko en Bostono, en la Internacia Terstacio de Higienaj Satelitaj Informoj en Guizhou-provinco, kun la celo per satelito fari longdistancon instruadon kaj trejnadon, akceli interlandan scienc-esploran kunlaboron pri higieno, epidemio, parazitozo, kardio-vaskula malsano, tumoroj k.a. kaj interŝanĝi materialojn pri publika higieno, klinika medicino, media higieno kaj administra scienco.

- Estis konstruita junie la scienc-teknika domo de Jiaotong (Ĝjaŭtong)-universitato de Ŝanhajo. Ĝi, 24-etaĝa kaj 106 m alta, estas destinita por scienc-esplora bazo de la fakoj de elektronika komunikado, fotofibro, aŭtomatizo, komputoriko k.a.

ARKEOLOGIO

- La arkeologia prifosado en la kavoj n-ro 2 de la Muzeo de Terakotaj Militistoj kaj Ĉevaloj en la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio en

Xi'an eniris la etapon por plene malkovri la tavolon de historiaj objektoj.

Nun, granda kvanto da terakotaj militistoj, ĉevaloj kaj ĉaroj eksponiĝas en origina formo ĉe la malkovriĝo. Precipe en la deka kvadrato la formacio el tri grupoj da ĉevaloj kaj ĉaroj altiras la rigardon. Klare videblas la konturoj de terakotaj militistoj kaj ĉevaloj, aloj, timonoj, radoj kaj spokoj de la ĉaroj.

MEDICINO

- La unua operacio de galvezika polipo de Ĉinio estas sukcese farita en Nankino per mikroonda endoskopo. En la dua tago post la operacio la operaciitino jam povis mem iri, havis normalan apetiton kaj elhospitaliĝis post nelonge. Mikroonda kuracado estas modere pagiga, oportuna kaj malmulte suferiga.

- La konstatita nombro de malsanulaj litoj por ĉiu milo da loĝantoj en Ŝanhajo estas 5.15 kaj tiu en Usono — 5.3. La meznombra vivdaŭro de ŝanhajanoj superis 77 jarojn.

Multaj maljunuloj ĝuas sanitaran servon en sia hejmo.


- Nun en Ĉinio rimarkinde progresis la baza esplorado pri kancerroj en la kampoj molekula, biokemia, medikamenta kaj epidemia. Per la progreso de la klinika esplorado pri kancerroj en la tumora kaj gena kampoj Ĉinio enviciĝis inter la avangardaj landoj. La esplorantoj turnas sian atenton al mez- kaj malfrufazaj kanceruloj kaj efike plibonigis la antaŭajn terapiojn. Kaj iuj terapioj, kiaj embolozaj kuracado, injektado de alkoholaĵo kaj mikroonda elektrokoaguliĝo, donas bonan efikon en klinika aplikado.

KULTURO

- Kamela ekspedicio el tri turkaj fotografistoj kaj usona filmoproduktisto ekvojaĝis la 2-an de junio por trairi la antikvan Nordan Silkan Vojon de Ĉinio, cele sperti malfacilaĵojn de antikvaj karavanoj kaj esplori la tieajn historion, kulturon kaj popolajn morojn.

La vojaĝo, utila al la kultura interfluo inter la Oriento kaj Okcidento, trovis subtenon de Ĉinio kaj Turkio.

- En vilaĝo de Shaanxi, nordokcidenta Ĉinio, estas 63-jara metiistino de papertranĉaĵoj. Ŝi nomiĝas Guo Peizhen. Kiam ŝi estis 8-jara, ŝi eklernis fari fenestrajn papertranĉaĵojn, argilajn homfigurojn kaj brodaĵojn. La plej granda el ŝiaj



S-ino Guo Peizhen

papertranĉaĵoj longas je 10 m kaj larĝas je 1 m; la plej malgranda estas 0.25-kvadrat-centimetra. Ŝiaj papertranĉaĵoj karakteriziĝas per versimileco de homfiguroj, bestoj, floroj, birdoj, insektoj kaj fiŝoj. Nun ŝiaj verkoj estas eksponataj en ŝia kaverndomo kaj ĉiutage altiras al si multajn en- kaj eksterlandajn turistojn.

MALOFTAĴOJ

- Paro da pandoj en la zoo de Hangzhou, Zhejiang (Ĝeĝjang)-provinco pasigis lastatempe sian 25-jariĝon. Ĝenerale, la pandoj, pli-ol-20-jaraj, povas esti rigardataj kiel longvivuloj. Tre malofte videblas, ke pandoj povas ĝisvivi la aĝon de 25 jaroj.



Julie en Pekino okazis ekspozicio de ĉinaj eldonaĵoj, la plej grandioza post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. En ĝi la Ĉina Internacia Eldona Grupo, ĝia membro la Ĉina Esperanto-Eldonejo kaj aliaj pli ol 600 eldonejoj eksponis siajn eldonaĵojn.

Sengrasiga gimnastiko

I. Kuŝu surdorse kun la brakoj ambaŭflanke de la korpo.

Levu la manojn horizontale ambaŭflanken de la korpo aŭ supren de la kapo kaj enspiru. Fleksu la dekstran genuon kaj levu ĝin supren. Tenu la fleksitan genuon per la manojn, proksimigu ĝin al la brusto kaj elspiru (Bildo 1). Faru tion alterne per la dekstra kaj maldekstra genuoj.

II. Staru kun la piedoj je distanco inter la ŝultroj kaj kun la fleksitaj kubutoj ambaŭflanke de la korpo.

Turnu la ŝultrojn kontinue kaj spiru harmonie (Bildo 2).

III. Staru kun la brakoj nature pendantaj ambaŭflanke de la korpo.

Levu la manojn supren, faru du paŝojn antaŭen kaj enspiru (Bildo 3). Faru alian paŝon antaŭen. Mallevu la manojn kaj elspiru.


IV. Staru kun la piedoj je distanco inter la ŝultroj kaj kun la manoj sur la talio. Levu la brakojn supren, fleksu la talion antaŭen (Bildo 4) kaj reprenu la originan pozon. Ripetu tion 10-15 fojojn.

V. Kuŝu surventre kun la brakoj ambaŭflanke de la korpo kaj kun la piedoj senmovaj. Levu la supran korpoparton supren, por ke la ŝultroj kaj ventro leviĝu for de la kuseno (Bildo 5), kaj reprenu la originan pozon. Ripetu tion 10-15 fojojn.

VI. Kuŝu surdorse kun la piedoj kunmetitaj kaj la brakoj rekte etenditaj supren. Levu la supran korpoparton kaj la piedojn, por ke la manoj tuŝu la piedfingrojn (Bildo 6). Ripetu tion 10-15 fojojn.

VII. Kuŝu surdorse kun la brakoj etenditaj ambaŭflanke de la kapo kaj la kruroj kunmetitaj. Enspirante profunde, malrapide levu la brakojn kaj metu ilin ambaŭflanken de la korpo. Streĉu la abdomenajn muskolojn kaj sidigu. Elspirante, malrapide remetite la brakojn sur la antaŭan lokon. Malrapide movu la supran korpoparton malantaŭen ĝis kuŝigo surdorsa. Faru tion 5-8 fojojn (Bildo 7).

VIII. Sidu kun la manoj apogantaj sin sur la tero. Fleksu la genuojn kaj kun metu la krurojn. Iomete levu la gluteojn kaj kalkanojn kaj kunmetu la genuojn. Turnu la talion dekstren. Tuŝu la teron per la dekstra genuo kaj reprenu la originan pozon. Faru tion 5-8 fojojn. Iomete levu la gluteojn kaj kalkanojn kaj kunmetu la genuojn. Turnu la talion maldekstren. Tuŝu la teron per la maldekstra genuo kaj reprenu la originan pozon. Faru tion ankaŭ 5-8 fojojn (Bildo 8).




Bildo 1



Bildo 2



Bildo 3



Bildo 4



Bildo 5



Bildo 6



Bildo 7



Bildo 8

Fraŭlino Jiaona

(Novelo)

SINJORO Kong Xueli estis pranepo de Konfucio. Li estis grandanima, taktoplena kaj lertega en poezio. Lia intima amiko servanta kiel guberniestro de Tiantai letere invitis lin al si. Kiam Kong alvenis la lokon, la amiko ĵus mortis. Pro tio li falis en malfacilojn kaj ne havis rimedon por hejmenreiri. Li do loĝiĝis en Putuo-monaĥejo, kie li dungis kiel skribisto de la bonzoj.

Pli ol cent paŝojn okcidente de la monaĥejo troviĝis la granda loĝejo de sinjoro Shan, kiu estis nobelido. Li perdis siajn riĉaĵojn en peza proceso, sekve transloĝiĝis en la kamparon kun sia malgranda familio, tial la loĝejo dezertiĝis.

Intage, neĝegis kaj neniu iranto troviĝis sur la vojoj. Hazarde sinjoro Kong preterpasis la pordon de la loĝejo kaj vidis, ke bela knabo eliras el ĝi. Ekvidinte Kong, li alpaŝis por lin saluti, demandis pri lia bonfarto kaj petis por la honoro lin gastigi. Pro plaĉeco de la knabo, Kong senhezite iris kun li en la loĝejon. La ĉambroj ne tre vastis, tamen ĉie pendis silkaj kurtenoj dekoraciaj kaj sur la muroj pendis pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj de antikvaj majstroj. Sur la skribotablo kuŝis libro titolita per «Hazardaj Notoj pri la Felando Langhuan». Ĝin foliumante, Kong trovis, ke ĝi plenas je strangaj aferoj neniam viditaj.

Ĉar la knabo loĝas en la domo de sinjoro Shan, Kong pensis, ke li estas ĝia mastro, kaj ne pridemandis lin pri lia familia stato. La junulo detale pridemandis lian vivon kaj lin kompatis. Li konsilis al Kong fondi privatan lernejon kaj labori kiel instruisto.

“Kiu bonvolus esti rekomendanto por mi, vagabondo?” diris Kong

post suspiro.

“Se vi ne rifuzus min pro mia senkapableco, mi volonte fariĝus via disĉiplo,” diris la junulo.

Kong tre ĝojis, tamen li ne arogis esti mentoro de la junulo kaj petis konsenton fariĝi lia amiko.

“Kial via loĝejo tiel longe ŝlosita?” demandis Kong.


“Ĝi estas loĝejo de sinjoro Shan,” respondis la junulo. “Ĉar la juna mastro transloĝiĝis al la kamparo antaŭ longe, ĝi restis longe neokupata. Mia familia nomo estas Huangfu kaj mia hejmloko estas en Shaanxi. Ĉar mia loĝejo detruigis en fajrego, ni loĝas ĉi tie portempe.” Nur tiam Kong eksciis, ke la junulo ne estas membro de Shan-familio.

Tiuvespere, ili interparolis gaje kaj la junulo petis Kong tranokti kun li sur la sama lito. Antaŭ elkrepuskiĝo iu servknabo hejtis braĝujon en la ĉambro. La junulo ellitiĝis la unua kaj iris en internan ĉambro, dum Kong ankoraŭ sidis envolvite en vata litkovrilo. La servknabo eniris kaj diris: “La maljuna sinjoro alvenas.” Kong surpriziĝis kaj haste ellitiĝis.

Maljunulo kun blankaj haroj ĉe la tempioj envenis kaj kore dankis Kong dirante: “Dankon, ke vi estas tiel afabla, ke vi ne forpuŝis mian malinteligentan filon kaj bonvolas lin instrui. Li

ĵus komencis skribaĉi, do ne traktu lin malrigore kiel egalulo pro tio ke vi estas amikoj.” Poste li donacis al Kong kompletan da silkaj vestoj, unu zibelan ĉapon, paron da ŝtrumpoj kaj paron da ŝuoj. Vidinte, ke Kong finis lavadon de sia vizaĝo kaj kombadon de siaj haroj, li ordonis arangi festenon. La mebloj kaj la vestoj nekonataj de Kong lukse brilis antaŭ liaj okuloj. Post kelkaj eltrinkoj de vino, la maljunulo stariĝis, diris ĝisrevidon kaj foriris kun sia bastono.

Post la mango la sinjoreto prezentis al Kong siajn ekzercaĵojn, kiuj ĉiuj estis skribitaj en klasika stilo, kaj neniu el ili estis verko en la moderna stilo laŭ la postuloj de ŝtata ekzameno. Demandite pri la kialo, li diris kun rideto: “Mi ne volas gajni sukceson en oficialaj ek-



zamenoj.”

Kiam vespero venis, la junulo denove drinkis kun li kaj diris: “Ni plene ĝuigu nin ĉi-vespere, sed ne plu morgaŭ.” Li alvokis la servknabon kaj diris al li: “Iru rigardi, ĉu mia patro endormiĝis. Se jes, voku ŝtele Xiangnu ĉtien.”

La knabo foriris, poste revenis kun brodita sako, kiu entenis bivon. Momenton poste, envenis servknabino fascina en koloraj vestoj. La junulo diris al ŝi, ke ŝi ludu «La Diinoj de Xiang-rivero». La knabino pinĉadis la kordojn per la ebura plektro kaj sekve aŭdiĝis melodio forte emocia kaj trista, kian Kong neniam aŭdis antaŭe. Poste, la junulo ordonis, ke ŝi servu ilin per grandaj pokaloj en drinkado. La orgio ĉesis nur noktomeze.

La sekvantan tagon ili ellitiĝis frue por kune studi. La sinjoreto estis tiel inteligenta, ke li povis enkapigi la tekstojn nur post tralego. Post du aŭ tri monatoj li jam povis verki belege. Ili interkonsentis kune drinki en ĉiu kvina tago, kaj je ĉiu tia drinkado la sinjoreto nepre veniĝis Xiangnu.

Iun nokton, kiam Kong jam trinkis multe da vino kaj ardiĝis lia koro, li fiksrigardadis la knabinon. La juna sinjoro tuj komprenis kion li pensis kaj diris: “La knabino estas kulturita de mia patro. Ĉar vi vivas enua sen edzino, delonge mi pensas pri tio tage kaj nokte. Mi nepre klopodos trovi por vi belan edzinon.”

“Se idealan kunulinon vi vere trovos por mi, ŝi nepre devas esti kiel Xiangnu,” diris Kong.

La sinjoreto ekridetis kaj diris: “Vi ja estas homo, kiu ofte miras pro senspereco. Se vi pensas, ke ŝi estas ideala kunulino, certe vi estas facile kontentigebla.”

Pasis duonjaro. Iutage, Kong volis promeni ekster la urbo, sed kiam li atingis la pordon, li trovis, ke la du klapegoj estas riglitaj de ekstere. Demandite la juna sinjoro diris al li: “Mia patro timas, ke societemo detiros mian atenton pri studo, tial li malakceptas la gastojn.” Sekve Kong lasis la ideon.

Kiam somero venis al la zenito,

estis sufoke varmege, tial ili translokis sian studejon en pavilonon en la ĝardeno. Sur la brusto de Kong aperis ŝvelaĵo en grandeco de persiko kaj post unu nokto ĝi atingis la grandecon de bovlo. Li ĝemadis pro dolorego. La juna sinjoro flegadis lin tage kaj nokte, neglektante manĝon kaj dormon. Post kelkaj tagoj la doloro pli akriĝis tiel, ke Kong eĉ ne povis manĝi kaj trinki. Ankaŭ la maljuna sinjoro alvenis rigardi kaj ili suspiris unu al la alia.

“En la antaŭlasta nokto mi cerbumis pri la malsano de mia instruisto,” diris la juna sinjoro. “Mi pensis, ke mia fratino Jiaona povas ĝin kuraci. Mi sendis iun al la avino por venigi ŝin, sed kial ŝi ankoraŭ ne alvenis?”

Momenton poste, la servknabo envenis kaj diris: “Fraŭlino Jiaona alvenis kaj kune kun ŝi alvenis la onklino kaj fraŭlino Asong.”

La patro kaj filo rapide iris en la internan ĉambron. Nelonge poste, la junulo enkondukis sian fratineton por pririgardi Kong. Jiaona estis dektri- aŭ dekkvar-jara, kun svelta korpo gracia kaj belaj okuloj brilantaj je inteligenteco. Vidante la belulinon, Kong tuj ĉesis ĝemadi kaj lia koro faciliĝis. “Li estas mia bona amiko,” diris la juna sinjoro al sia fratino, “pli intima ol frato al mi. Faru kion vi povas por lin resanigi, franjo.”

Venkinte sian hontemon, la knabino kuspis siajn longajn manikojn kaj proksimiĝis al la lito por ekzameni la malsanulon. Kiam ŝi palpis lian pulson per sia mano, li sentis aromon de ŝia korpo pli agrablan ol tiu de orkideo.

La knabino diris kun rideto: “Ne mirinde, ke vi havas tian malsanon, ĉar via koro estas afekciita. La malsano estas en kriza stadio, tamen ankoraŭ kuracebla. La ŝvelaĵo jam malmoliĝis, estas nepre necese detranĉi la haŭton kaj karnon.”

Poste ŝi deprenis la oran braceleton de sur sia brako, metis ĝin sur la ŝvelaĵon kaj premis ĝin malsupren iom post iom. La ŝvelaĵo altiĝis je unu colo super la braceleto kaj ĝi ne plu estis tiel vasta kiel bovlo. Poste, la knabino malfermis la bas-

kon de sia silka robo, elprenis ponardon kun klingo tiel maldika kiel papero. Per unu mano premante la braceleton kaj per la alia tenante la tranĉilon, ŝi tranĉis delikate ĉe la radiko. Purpura sango eltorentis malpurigante la maton sur la lito. Sed Kong, deziregante la proksimecon de la ĉarmulino, ne nur ne sentis doloron, sed male timis, ke rapide finiĝos la operacio kaj ne longe daŭros ilia proksimeco.

Baldaŭ estis detranĉita la bulo de putra karno simila al gajlo detranĉita de arbo. Poste la knabino petis alporti akvon, per kiu ŝi lavis la vundon. Tion farinte, ŝi elbuŝigis ruĝan pilolon en grandeco de kuglo, metis ĝin sur la karnon kaj rulis ĝin ĉirkaŭ la vundo. Je ĝia unua rondiro, Kong sentis brulan varmon; je la dua rondiro, jukis la vundo kaj je la tria rondiro, li sentis agrablan friskon tra la tuta korpo, kiu penetras ĝis la medolo de liaj ostoj. La knabino remetis la pilolon en sian buŝon kaj diris: “Vi resaniĝis!” Kaj ŝi rapide eliris.

Kong saltleviĝis kaj kuris danki ŝin kaj sentis, ke la peza malsano tute malaperis. Sed post tio, la ĉarmo de la belulino briladis en lia menso, ke li neniel povis deturni sin de pensado pri ŝi. De tiam li neglektis sian studon, sidis gapante kaj sentis neesprimeblan enuon.

La sinjoreto, kiu travidis la kaŭzon de lia malĝojo, diris al li: “Mi serĉadis, elektadis kaj jam trovis por vi belan knabinon.”

“Kiu ŝi estas?” demandis Kong.

“Ankaŭ ŝi estas mia parenĉino,” respondis la juna sinjoro.

Kong longe meditis kaj diris firme: “Ne ĝenu vin.” Li turnis sian vizaĝon al la muro kaj recitis:

*Al mar-vidinto ne l' aliaj akvoj
menciindas;
nur nuboj de la monto Wushan
vere admirindas.*

La juna sinjoro sciis, kion tio signifas, kaj diris: “Mia patro tre admiras vian grandan talenton kaj de longe deziras parenĉigi vin per nupta interligo. Sed mi havas nur fratineton, kiu estas ankoraŭ tro

juna. Fratino de mia patrino havas filinon nomatan Asong, kiu estas jam dekok-jara kaj tute ne malbela. Se vi ne kredas min, atendu en la antaŭĉambro kaj vi vidos mian kuzinon Asong, kiam ŝi faros sian kutiman promenon en la ĝardeno.”

Kong faris laŭ lia konsilo kaj vere vidis, ke Jiaona venas kun belulino kun pentritaj arkaj brovoj kaj lotusflore graciaj piedetoj en feniksoformaj ŝuoj. Ŝi estis same aminda kiel Jiaona. Kong tre ĝojis kaj petis, ke la juna sinjoro lin helpu kiel svatisto.

En la sekvanta tago la juna sinjoro alvenis kaj lin gratulis, dirante: “Jam aranĝite!”

Alia korto estis purigita kaj ordigita por li kaj sekve okazis la geedziga ceremonio. Tiuvespere gaje bruis tamburoj kaj sonoraj surnaoj (kupra blovinstrumento de Ĉinio), skuante la aeron. Vidante, ke la prisonĝita feino subite kuŝos kun li en sama lito kaj sub sama kovrilo, Kong sentis, ke la Luna Palaco eble ne troviĝas en la ĉielo sed sur la tero. Post la geedziĝo ili kunvivis plezure en plena kontento.

En iu vespero la juna sinjoro diris al Kong: “Mi neniam forgesos vian helpon en instruado al mi. Sed sinjoro Shan jam revenis lastatempe fininte la proceson kaj volas repreni la loĝejon tre urĝe, tial ni pensas, ke ni devas forlasi la lokon kaj translokiĝi okcidenten. Kredeble estos malfacile por ni denove kunesti, tial malĝojo pro la disiĝo turmentadas mian koron.”

Kong esprimis sian volon iri kune kun ili, sed la juna sinjoro konsilis, ke li reiru al sia hejmloko. Kong timis, ke tio estas malfacila por li.

“Ne maltrankviliĝu pro tio,” diris la juna sinjoro, “mi tuj akompanos vin al la hejmo.”

Post nelonge, la maljuna sinjoro alkondukis Asong kaj donacis al Kong cent taelojn da oro. La juna sinjoro kaptis la manojn de la geedzoj kaj diris al ili, ke ili fermu la okulojn kaj ilin ne apertu. Ili soris en la aeron kaj aŭdis, ke vento siblas ĉe la oreloj. Post longa momento la juna sinjoro diris: “Jen ni al-

venas.”

Kong malfermis siajn okulojn kaj vere vidis sian hejmon. Nun li eksciis, ke la juna sinjoro ne estas ordinara homo. Kong frapis je la pordo. Lia patrino elvenis kaj surpriziĝis. Vidinte la belan bofilinon, ŝi dividis kun ili koran ĝojon. Kiam Kong returnis sian kapon, li rimarkis, ke la juna sinjoro jam malaperis.

Asong pruviĝis tre bona bofilino en servado al la bopatrino kaj famiĝis pro siaj beleco kaj virteco. Poste, Kong sukcesis trapasi kortegan ekzamenon kaj fariĝis ĝinŝi-o**. Li ricevis postenon de juĝisto en Yan’an, kaj veturis tien kun sia familio, sed lia patrino ne kuniris pro la malproksimeco. Asong naskis filon, kiu ricevis la nomon Xiaohuan.

Poste, Kong perdis sian oficon pro ofendo al revizoro, sed ne povis reveni al sia hejmloko pro nesolvita problemo. Iutage, kiam Kong ĉasis eksterurbe, li renkontis belan junulon rajdantan sur nigra ĉevalo. La junulo foj-refoje rigardis al li. Post atenta rigardo li rekonis en li junan sinjoron Huangfu. Ili ektiris la bridojn, haltigis la ĉevalojn kaj salutis unu la alian kun intermiksitaj sentoj de ĝojo kaj malĝojo. La juna sinjoro invitis Kong al sia hejmo. Ili do venis al vilaĝo tiel dense ombrita de arboj, ke la suno kaj ĉielo fariĝis apenaŭ videblaj. La pordo de la loĝejo de sinjoro Huangfu estis ornamita de orumitaj rondkapegaj najloj en stilo de bienula domo. Demandite, la juna sinjoro diris al Kong, ke lia fratinetto jam edziniĝis kaj la patrino de Asong jam forpasis. Kong esprimis koran kondolencan. La sekvan tagon Kong foriris kaj poste revenis kun sia edzino. Ankaŭ Jiaona alvenis. Ŝi prenis la filon de Kong en siajn brakojn kaj diris: “Vidu, mia kuzino hibridigis nian rason!”

Kong denove dankis ŝin pro ŝia kuraco de la ŝvelaĵo.

“Bofrato, vi jam fariĝis eminenta persono,” diris Jiaona kun rideto. “Via vundo jam kuraciĝis kaj tamen vi ankoraŭ ne forgesis la doloron?” Ankaŭ sinjoro Wu, la edzo de Jiaona, alvenis ilin saluti, kaj foriris

post du tagoj.

Iutage, la juna sinjoro venis al Kong kun ĉagrena mieno kaj diris al li: “La Ĉielo faligos katastrofon sur nin. Ĉu vi bonvolus nin helpi?” Kong ne sciis, pri kio temas, tamen li tuj donis sian promeson.

La juna sinjoro eliris kaj enkondukis sian tutan familion en la salonon por kotoŭi (adorkliniĝi) al li. Kong konsterniĝis kaj anksie demandis pri la kialo.

“Mi ne estas homo sed vulpo,” diris la juna sinjoro. “Nun ni estas minacataj de puno per tondro. Se vi nin helpos je vivrisko, eble nia familio saviĝos. Alie, bonvolu foriri kunportante vian filon, ke vi ne implikiĝu.”

Kong ĵuris dividi vivon kaj morton kun ili. La juna sinjoro diris al li, ke li staru ĉe la pordo kun spado en mano kaj ke li ne moviĝu, kiam tondro frapos. Kong faris laŭ lia diro. Baldaŭ malhelaj nuboj similaj al bazaltaj rokoj kovris la ĉielon kaj fariĝis mallume. Li returnis sian rigardon al la domo, kie li estis, kaj vidis, ke la pordo malaperis, anstataŭe tie staris alta teramaso kun senfunda truego ĉe la bazo. Dum lia koro pleniĝis je mirego, subite tondrego skuis la montojn. Torenta pluvo kaj ventego ekfuriozis kaj grandaj arboj estis elradikitaj. Malgraŭ la blindigaj fulmoj kaj surdigaj tondroj, Kong firme staris senmove. Subite en la densa nigra nebulo simila al ruliĝanta fumo aperis monstro kun akra beko kaj longaj ungoj, kiu kaptis unu homon el la kavo kaj soris alten laŭ la fumo. Je fulma ekrigardo Kong vidis la vestojn kaj ŝuojn kaj li pensis, ke tio ŝajne estas Jiaona. Li tuj saltis de la grundo en la aeron, atakis la monstron per sia spado kaj ĝi falis je lia bato. Subite eksplodis tondrego, Kong falis teren kaj mortis.

Momenton poste, la ĉielo sereniĝis kaj Jiaona rekonsciiĝis. Vidinte ke Kong kuŝas morta apude, ŝi ekploris triste kaj lamentis: “Se mia kara bofrato Kong mortis pro mi, kial do mi ankoraŭ vivu plu!”

Ankaŭ Asong elvenis kaj ili kune portis Kong hejmen. Jiaona diris al Asong, ke ŝi tenu ambaŭ-

mane lian kapon, kaj lia frato klo-
podis malfermi lian buŝon per ora
harpinglo. Jiaona mem tenis lian
mentonon, enbuŝigis al li ruĝan pi-
lolon per sia lango kaj ĝin enblovis
tuŝante liajn lipojn per la siaj. La
pilolo iris en la gorĝon per la blovo,
aŭdigante gluglojn. Baldaŭ Kong
rekonsciigis. Vidante la tutan fami-
lion antaŭ si, li sentis, ke li vekigis
el sonĝo. Sekve feliĉe reunuiĝis la
parencaro kaj ĝojiĝis post la terura
travivaĵo. Kong opiniis, ke tiu sova-
ĝa dezertejo ne taŭgas por loĝado,
kaj proponis, ke ĉiuj iru kun li al lia
hejmo. Ĉiuj aprobis lian ideon es-
cepte de Jiaona en malĝojo. Kong
proponis, ke ankaŭ ŝia edzo Wu iru
kune kun ili, sed ŝi timis, ke la
bogepatroj ne volas disiĝi de sia
juna filo. Do decido ne estis farita
en tiu tago post interkonsilo.

Neatendite, servknabo de Wu-
familio alrapidis spiregante kaj ŝvi-
tante. Ĉiuj surpriziĝis, detale pride-
mandis lin kaj informigis, ke ankaŭ
la familio de sinjoro Wu trafis ka-
tastrofon en la sama tago kaj pereis
ĉiuj ĝiaj membroj. Jiaona stamfis
pro ĉagreno kaj larmadis senĉese.
Ĉiuj klopodis ŝin konsoli. Kaj pro
tio decidiĝis kuna foriro al la hejmo
de Kong.

Kong iris al la urbo Yan'an por
aranĝi siajn aferojn dum kelkaj ta-
goj. Poste, ĉiuj haste faris pakadon
eĉ nokte por la vojaĝo. Kiam ili
alvenis al la celloko, Kong loĝigis
la junan sinjoron en nefrekventata
ĝardeno, kies pordon ĉi tiu ofte ŝlos-
is de interne. La riglilon li formovis
nur kiam Kong kaj Asong faris vi-

ziton al li. Kong ŝakludis, drinkis
vinon, festenis kaj konversaciis kun
la juna sinjoro kaj lia fratino, kva-
zaŭ ili apartenus al unu sama fa-
milio. La infano Xiaohuan plen-
kreskiĝis kaj fariĝis bela junulo kun
iom da vulpeco. Kiam popolanoj
vidis lin promenanta en la urbo, ili
ĉiuj sciis, ke li estas filo de vulpino.

La registrinto de la mirrakon-
toj komentis: "Mi envias sinjoron
Kong ne pro tio, ke li trovis ĉarman
edzinon, sed pro tio, ke li akiris
belan intiman amikinon. Rigar-
dante ŝian vizaĝon, oni povas forge-
si malsaton kaj aŭskultante ŝian
voĉon, oni povas senti ridetemon.
Akirinte tian bonan amikinon por
ofte interparoli kaj kune trinki kaj
manĝi, oni povas eldoni sian ani-
mon por ŝia belo, kio ja multe su-
peras la plezuron de amoraj kare-
soj." ■

Elĉinigita de LAŬLUM

*Pu Songling (1640-1715) estis
literaturisto de Qing-dinastio. Li ver-
kis la novelaron "Mirrakontoj de
Liaozhai", kiu priskribas la kortuŝan
amon inter homoj kaj feinoj, fanto-
moj, vulpospiritoj, eĉ vermospiritoj
k.a. Tiu ĉi novelo estas el "Mirrakon-
toj de Liaozhai".

**Ĝinŝi-o — Ekde Sui-dinastio
(581-618 p.K.) la ĉina registaro
praktikis sistemon de ŝtataj ekzame-
noj por elekti kandidatojn de civilaj
kaj militaj oficistoj. Kiu sukcesis en
kortega ekzameno kun ĉeesto de im-
periestro, tiu povis ricevi la honoran
titolon ĝinŝi-o.

GALERIO

"Umefloroj kaj Cignoj"

de HU JIE

Tiu ĉi silka pentraĵo, kiel unu
el la raraj grandaj antikvaj
pentraĵoj de Ĉinio, estis farita
de Lü Ji (Lju Ĝji), fama pen-
tristo pri floroj kaj birdoj de
Ming-dinastio (1368-1644).
Ĝi, 240 cm alta kaj 151 cm
larĝa, konserviĝas en la Arta
Muzeo Jicuiyuan (Ĝjicujjŭan)
de Fujian(Fuĝjan)-provinco.

Lü Ji (1477-?) servis en la
kortego kaj lertis en pentrado
de birdoj, kiaj fenikso, gruo,
pavo kaj cigno, kun floroj kaj
arboj kiel fono. Kombinante
delikat-linian konturadon kaj
tuĉdesegnadon, li pliriĉigis la
esprimivon de ĉinaj pentraĵoj
de birdoj kaj floroj. Li estis
unu el la reprezentantoj de la
famaj pentristoj de floroj kaj
birdoj de Ming-dinastio. Liaj
pentraĵoj plejparte konservi-
ĝas en ŝtataj muzeoj ĉinaj kaj
eksterlandaj.

La pentraĵo "Umefloroj kaj
Cignoj" bildigas, ke sur la
branĉoj de maljuna umearbo
disvolviĝas floroj kiel flirtantaj
neĝeroj. Sur la degelinta lage-
to naĝas paro da cignoj. Unu
el ili kun alte levita kapo rigar-
das al la ĉielo kaj la alia retro-
rigardas kvazaŭ al naĝantaj
fiŝoj, kun kurbigita kolo. Paro
da papagoj postkuras mal-
grandan papilion, la alia paro
da papagoj sidas sur branĉo.
Unu el ili per streĉitaj okuloj
rigardas la ĉasantajn kaj la
alia sidas tute senmove. Sur
la bordo verdas herboj kaj
floras rozoj.


Anonco

Nia klubo baldaŭ festos 50-jaran E-aktivadon.
Bonvolu saluti ĝin, sendante ankaŭ fotojn, propa-
gandilojn kaj ekspoziciaĵojn. Adreso: Esperanto-
societo "Hristo Kozlev" PK 61, 5180 Polski
Trambeŝ, Bulgario. Anticipan dankon!

**Esperanto-societo
"Hristo Kozlev"**



Itala metal-skulptisto kaj e-isto Mar-
to Convento en kreado
de **GIUSEPPE TRAMBAIOLO** (Ita-
lio)



S-ano Mar to Convento kaj
liaj verkoj de **GIUSEPPE
TRAMBAIOLO** (Italio)

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九六年第十期
(本刊代号:二——九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2

